

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Celoj valoroj kaj
principoj de KEA

Denove batalo por la
germana lingvo

Horst Vogt pri “Esenco
kaj estonteco...”


Halina Gorecka
pri PV, PIV, NPIV

Sergio Pokrovskij pri
la landnomoj

Originala novelo de
Paul Gubbins

Poemoj de Gavriil
Derĵavin

Literatura konkurso
“Liro-2008”



Majo
2008

№5

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №5 (163)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2008, №5 (163).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 апреля 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de Komitatano Z.

Ĉu vesti sin ĉemize?

En aprilo Renato Corsetti fiere anoncis, ke alĝeria gazeto aperigis senpage anonceton pri la ebleco lerni Esperanton kaj ke UEA ricevis 53 petojn pri lernomaterialo. Tio memorigas pri kampanjo de Hans Bakker en la 1980aj jaroj en afrikaj gazetoj, kies rezultoj nun videblas kiel amaseta nombro da afrikaj esperantistoj. La agado de Bakker tamen esence estis konscienc-trankviliga filantropio de triamondisma romantikulo kaj ĝia efiko povos esti same efemera kiel la evoluhelpo el riĉaj landoj al la Tria Mondo. Espereble la orientiĝo de UEA al arabaj landoj daŭros kaj ne montriĝos nur laŭvica modo. La araba mondo estas pli grava dezerto en Esperantio ol siatempe la nigra Afriko, ĉar ĝi estas pli evoluinta kaj ĝia ekonomia, politika kaj religia rolo en la monda vivo ĉiam pli grava.

La anonceto de Corsetti memorigas ankaŭ pri la anoncigoj de la japano Miyoshi, kiuj de kelkaj jaroj aperas tutpage en gravaj eŭropaj tagĵurnaloj. Nur ne atingis nin raportoj pri rezultoj. Tio verŝajne signifas, ke ili mankas, ĉar esperantistoj ja kutimas blovi ĝis multoblo eĉ la plej etajn sukcesojn. En renomaj ĵurnaloj tutpaĝa reklamo kostas plurajn dekmilojn da eŭroj. Per tiaj sumoj saĝa kampanjo povus altiri lavangeton da informpetoj, se tio sukcesis eĉ al eta anonceto en Alĝerio. Kial Miyoshi ne sukcesas? Ĉu ne devus UEA aŭ Eŭropa Esperanto-Unio analizi, kial la pompa reklamado estis tiel malfekunda? Ĉu la prestiĝo de UEA ne sufiĉus por persvadi la mecenaton al rekonsideroj? Espereble tamen ne estas tiel, ke la ĝisnuna kampanjo okazis kunlabore kaj kunplane kun UEA kaj EEU!

Informado ŝajnas esti malfacila arto, kiun ne scias lerni ĉiuj. Laŭ sia koncepto eĉ pli miriga ol la reklamoj de Miyoshi estas la absurda naivismo de iu Peter Weide, kiu antaŭ iom da tempo aperigis reklamon en la UEA-organo kaj eĉ kreis retpaĝon pri "ŝvitĉemizoj" kun la vorto Esperanto. Li rezonis, ke la publiko ne konas Esperanton, pro kio esperantistoj vestu sin per liaj ŝvitĉemizoj kaj dispromenu laŭ stratoj por vekti la atenton de la neklera maso. Feliĉe Weide ne damaĝas la eksteran reputacion de Esperanto, ĉar li skribas nur sur ĉemizojn, kiujn neniu legas, sed estas iom strange, ke UEA donis reklamspacon por lia banala filozofio. Devus ja esti tasko de nia monda tegmento eduki membrojn ankaŭ pri tio, kia informado estas sencohava. Eble temis tamen pri tio, ke UEA taksis la inteligenton de la legantoj sufiĉe alta por vidi la banalecon kaj prenis el la iniciato ĝian solan eblan utilon, la anoncpaĝon.

Fine ni gratulas al UEA pro ĝia kandidatigo por la Nobel-pacpremio. Ĉi-jare tio rezultigis multe da publiko, ĉar ne nur esperantistoj zorgis pri tio, sed ankaŭ iuj proponintoj mem diskonigis sian faron. UEA verŝajne ne bezonas fari planojn pri la uzo de la grandega premio, sed sole la ricevita informo efiko estas bela donaco al la 100-jara asocio komence de ties jubilea jaro. Restas enigmo, ke ĝi mem ne donas pli laŭtan atenton al sia jubileo, sed tio estas alia rakonto.

Komitatano Z

La kovrilpaĝa foto, afable disponigita de UEFA, memorigas, ke la 21an de majo 2008 Moskvo akceptos la finalon de la Ĉampiona Ligo. Ĉu Moskvo akceptos post du jaroj ankaŭ la esperantistan mondkongreson?

Celoj, valoroj kaj principoj de Kataluna Esperanto-Asocio

Laŭlonge de la tuta jaro 2007 okazis en Kataluna Esperanto-Asocio diskutoj pri teksto fiksanta ĝeneralan starpunkton de la asocio, kiu permesos antaŭenirigi strategian planon. La tuta procezo estis farita unue de komisiono, kiu kolektis ideojn en pluraj debatoj okazintaj dum la jaro en naciaj esperanto-renkontiĝoj. En septembro, unua versio de la teksto estis dissendita al la du retlistoj de katalunaj esperantistoj (por junuloj kaj plenaĝuloj) por kolekti ideojn, kaj en oktobro oni samcele diskonigis malneton sur la paĝoj de *Libera Folio*, kiu vekis riĉigan debaton. En januaro, nova versio estis denove distribuita en la retlistoj, februare la tekstoproponon oni sendis al la tuta membraro kaj fine, en marto, la asembleo de la asocio aprobis la definitivan tekston.

Kataluna Esperanto-Asocio deziras esprimi siajn celojn, valorojn kaj principojn. Nia agado estas bazita sur la aplikado de la rajtoj agnoskitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en la Universala Deklaracio de la Kultura Diverseco, en la Universala Deklaracio de la Lingvaj Rajtoj kaj en la Manifesto de Prago. Por atingi niajn celojn, kiel vivanta parto de la popolo, ni laboras kune kun la landa socia reto, kaj ni same kunlaboras kun la institucioj, ne perdante nian sendependecon nek nian identecon.

Celoj de la Asocio

a) Disvastigi en la katalunlingva teritorio esperanton, kiel neŭtralan internacian helplingvon, kiel la plej bonan eblon por lingva demokratio, garantiantan la valorojn de la lingvaj rajtoj, de la lingva diverseco kaj de la rajto al plena komunikado inter homoj kun malsamaj lingvoj.

b) Instigi en la katalunlingva teritorio la uzadon de la propra lingvo kaj diskonigi la katalunan kulturon en la mondo kaj aliajn kulturojn pere de esperanto.

Valoroj de la Asocio

a) La lingvaj rajtoj, komprenataj kiel nedisigebla komplemento de la homaj rajtoj.

b) La lingva diverseco, komprenata kiel esenca parto de la kultura diverseco.

c) La rajto al plena komunikado inter homoj kun diversaj lingvoj, kiel rimedo por venki la antaŭjuĝojn, survoje al paco-kulturo.

Principoj de la Asocio

En nia aktivado por la lingvaj rajtoj ni konsideras, ke:

— La **lingvaj rajtoj**, disvolvigitaj surbaze de la **homaj rajtoj**, estas esenca elemento de libereco kaj de paco.

— La **egaleco de lingvaj rajtoj** de la individuoj kaj de la komunumoj estas esencaj por tiu celo. Nenio devas miskomprenigi, ke ekzistas lingvoj pli taŭgaj por difinitaj celoj, kvankam la plej privilegiitaj tavoloj de la hegemoniaj komunumoj kaj de tiuj asimilitaj ofte instigas tion pensi al multaj homoj per sia ekonomia, politika kaj milita potenco aŭ pro sia prestiĝo.

— La **diverseco** estas garantio de kultura riĉo. La senombraj formoj fari kaj diri estas parto de la **komuna homa heredaĵo**, trezore akumulita dum jarmiloj. Ni volas kontribui al la vivtenado de la kultura diverseco kaj, aparte, de tiu lingva.

— La **komunikado** inter la diversaj komunumoj estas necesa por interkonatiĝo, helpanta al la libereco de ĉiu el ili, kio estas fundamento de **paco**. La flueco de komunikado inter

la komunumoj kreskigas senton de **solidareco** kaj samtempe ebligas, ke la diversaj kulturoj komplemente riĉigu unu la alian. Ni volas kontribui al tio, ke la informflujoj fariĝu vere **multflankaj**.

— Ni konsideras nesufiĉa la celon korekti la preskaŭ-monopolon de unu nacia lingvo en la monda interkomunikado per **oligopolo de kelkaj lingvoj**.

— Ni konsideras la konceptan kaj valoran dividon inter lingvoj internaciaj, naciaj kaj regionaj, manifestiĝo de **lingva imperiismo**. Neŭtrala lingvo, kiel esperanto, povas agi kiel **ponto**, favorante kaj substrekante la plenan egalecon de la lingvoj.

— La uzado de neŭtrala internacia helplingvo, aŭ *interlingvo*, ne devas negative influi la ĉiutagan vivon de la lingvaj komunumoj kaj oni devas ĝin rezervi, pere de taŭga konsciigo kaj trafikaj lingvopolitikoj, por specifaj funkcioj, por ne damaĝi la **ekologian ekvilibron** inter ili. Ĉion, kion povas plenumi la lokaj lingvoj, ne devas plenumi la tutmonda interlingvo.

— Por kontribui al tiu ekvilibro, ni konsideras necesa **pozitivan diskriminacion** por atingi la normaligon de la minorigitaj lingvoj en ties medio aŭ teritorio kaj tiel defendi la lingvan diversecon. Krome, ni pledas por la rajto de la enmigrintoj lerni sian denaskan lingvon, inkluzivante ĝin en la rajton je movo de la homoj.

— La uzado de neŭtrala interlingvo, apud tiu propra, ne ekskludas, sed favorigas la uzadon de aliaj lingvoj danke al la tempoŝparo per la lernado de punta lingvo kaj al la disvastigo de la konscio pri egaleco, valoro kaj respekto por la lingva diverseco: ni opinias, ke dezirindas **instigi la lernadon de fremdaj lingvoj**, ĉefe de tiuj geografie kaj kulture proksimaj. La **pasiva plurlingveco** estas taŭga eblo por helpi la komprenon de pliaj lingvoj sen damaĝi tiun propran.

— La uzado de interlingvo neŭtrala kaj facila estas grava, sed malsufiĉa per si mem. Kvankam ĝi estas praktika pruvo de la egaleco inter la lingvoj, kaj ni konstatas, ke tiu justocela perspektivo enradikiĝas en konsiderinda parto de la esperantolingvanoj, ni konsideras, ke **gravas la plua edukado al la valoroj de la diverseco kaj de la egaleco de rajtoj, specife de tiuj lingvaj**.

(Traduko de la teksto aprobata de la asembleo de Kataluna Esperanto-Asocio, la 1an de marto 2008.)

Esperanto-stando en la tradicia asocia foiro kadre de la Nacia Tago de Katalunio (Barcelono, 11 sep 2007)



Feliĉan Paskon!

La 23an de marto, je la romkatolika Pasko, post sia tradicia mesaĝo en la placo Sankta Petro, Papo Benedikto la 16a diris bondezirojn en 63 lingvoj.

En Esperanto li diris: “Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta”.

La bondeziron en Esperanto (post la samao kaj antaŭ la guarani`a kaj la latina) atendis grupo da esperantistoj, gvidataj de Giovanni Conti, kiuj, tradicie ĉeestas Paske kaj Kristnaske, en la placo Sankta Petro.

Sub pluvego ili levis panelojn kiuj konsistigas la vorton *Esperanto*. Sed pro la fortega pluvo ne eblis resti longtempe starantaj: ili levis la panelojn nur ekde la komenco de la salutoj ĝis ilia fino.

Kelkaj televidoĵoj (ekzemple, *Euro-News*) montris la grupeton.

Laŭ www.ikue.org

En konferenco de lingvotestistoj

UEA kaj ILEI reprezentis 10–12 apr 2008 en renoma internacia konferenco en Kembriĝo (Britio) Esperanton kaj la ellaboratan novan internacian lingvoekzamenon de Esperanto, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo kaj difinas lingvokonajn normojn.

Temas pri konferenco de Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo (ALTE), sed inter ĝiaj partoprenantoj estas ekzamenfakuloj el la tuta mondo. Krom fakprelegoj, grupkunsidoj, pritraktado de diversaj aspektoj kaj socia rolo de la testado de fremdlingva kono, prezentigis ankaŭ la ebleco konatiĝi kun gekolegoj el prestiĝaj edukinstitucioj kaj internaciaj fakorganizajoj.

La novaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI laŭ la Komuna Eŭropa Referencokadro (KER) estas ellaborataj en niveloj B1, B2 kaj C2 kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamencentro (ITK) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la ŝtate rekonataj fremdaj lingvoj kaj kadre de ties ekzamensistemo havas la samajn rajtojn kiel la aliaj fremdaj lingvoj. Plurmil kandidatoj estas testataj ĉiujare en la menciitaj niveloj en la t.n. dulingva (hungara-Esperanta) versio de la lingvaj ekzamenoj.

En la konferenco de ALTE partoprenis Zsófia Kóródy, la vicprezidanto de ILEI. Ŝia partopreno provizis al UEA kaj ILEI bonan okazon por spertiĝi en ne-esperantista faka medio, ekhavi informojn pri novaj esploroj kaj lerni pri la daŭra evoluo de internacia lingvotestado.

GK UEA



Omaĝe al Zamenhof

Ĉi-jare la 91-an mortodatrevenon de Ludoviko Zamenhof oni omaĝis en Bjalistoko la tutan tagon.

Komence en la Junulara Kulturdomo okazis malfermo de la ekspozicio “Bjalistokaj infanoj ilustras la Esperantan eldonon de la libro *Reĝo Maĉjo la I-a* de Janusz Korczak”. La libro estos aĉetebbla dum la 93a UK en Roterdamo.

Poste apud la monumento al Ludoviko Zamenhof okazis manifestacio de esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Venis ankaŭ pli ol 130 lernejanoj, kiuj la 14an de aprilo kun vojaĝgvidantoj vagabondis tra la urbo laŭ la spuroj de Zamenhof kaj Esperanto.

La plej malgrandaj bjalistokanoj el la Infanĝardeno №52 (kie oni instruas Esperanton) sendis en sapvezikoj alvokon al la ĉielo. Tre serioze subtenis ilin la estro de la urba konsilantaro Leszek Kusak kaj la vicurbestro de Bjalistoko Aleksander Sosna, kiuj kun honora akompano de urbaj gardistoj venis por meti florojn (*vidu sur la supra foto*).

Vespere, en la kafejo *Fama* ni partoprenis la malfermon de la unua ekspozicio de Zamenhof-Muzeo *Esperanto en eŭropaj gazetoj*. Poste en la sama kafejo Barbara Pietrzak prelegis pri *Esperanto en medioj*.

Fine oni komune spektis sur granda ekrano la Esperantan version de la filmo *Poto da oro*, faritan de Bjalistoka Televido pri bjalistokaj esperantistoj el la intermilita tempo.

Ela Karczewska

La Fina Venko ... en unu enketo

6 mar 2008 aperis finrezulto de la enketo *Kiu lingvo por Eŭropo?* de la aŭstra taggazeto *Der Standard*:

7783 voĉoj por Esperanto (65,9%)
1398 voĉoj por la germana (11,8%)
1258 voĉoj por la angla (10,6%)
847 voĉoj por la franca (7,2%)
292 voĉoj por la gepatra lingvo (2,5%)
123 voĉoj por aliaj (1%)
116 voĉoj por la hispana (1%)

Leopold Patek

Granda intereso de ĵurnalistoj

Je 31 mar 2008 al la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, kiu okazos fine de majo en Vilno, la ĉefurbo de Litovio, aliĝis 164 esperantistoj el 35 landoj. La plej multaj (52) estas el la kongreslando Litovio, sekvas Pollando (21), Ruslando (12), Germanio kaj Svedio (po 6).

La kvanto da aliĝintoj jam superis la planitan kvanton (100 eksterlandaj kaj ĉ. 30 litovaj esperantistoj), tial aliĝoj ne plu estos akceptataj, krom eventuale kelkaj speciale invititaj personoj.

Ĉar venis tro multaj sinproponoj por kontribui al la kongresa programo, ne ĉiuj proponoj estis akceptataj.

Povilas Jegorovas

Zamenhof en loteria bileto

La portreto kaj la nomo de Zamenhof ornamas venontan loteribiletan de la hispana blindulara organizo.

La Organizo de Hispanaj Blinduloj ONCE estas certe unu el la plej sukcesaj en la tuta mondo, pro siaj laboroj en la integriĝo de blinduloj en la socio. Granda parto de la sukceso ŝuldiĝas al ties loterio, tre konata en la tuta lando per la nomo *Cupón*. Tiu *kupono*, vendata ĉiutage, kaj kun specialaj premioj en difinitaj tagoj de la semajno, montras foje specialajn bildojn kun diversaj motivoj.

17 maj la kupono portos la portreton de D-ro Zamenhof, kun la teksto, “L.L. Zamenhof, creador del esperanto, precursor en la creación de un mundo para todos”, kaj apude “2008, Año Internacional de los Idiomas” (“L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, pioniro en la kreado de mondo por ĉiuj. 2008, Internacia Jaro de la Lingvoj”).

Ĉi tion iniciatis laborgrupo, kiu en la sino de Hispana Esperanto-Federacio organizis diversajn agadojn por la kummemoro de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008, koincide kun la centjariĝo de UEA. Grandan meriton oni ŝuldas al la demarŝoj faritaj de nia samideano Pedro Zurita, kiu dum multaj jaroj okupis la postenon de ĝenerala sekretario en la Tutmonda Unuiĝo de Blinduloj.

Hispana Esperanto-Federacio



Internacia Iberia Renkontiĝo

14 mar kunvenis preskaŭ cent esperantistoj el pli ol sep landoj en Benicàssim (Valencilando), por tri tagoj, okaze de la Internacia Renkontiĝo 2008, organizita de la Kataluna Esperanto-Junularo. Temas pri la kvara Iberia Renkontiĝo, kiun ĉiujare vice organizas Kataluna Esperanto-Junularo, Portugala Esperanto-Junularo kaj Hispana Esperantista Junulara Societo.

La organizantoj ĉi-foje volis substreki la plurlingvecon de la duoninsulo per uzado de la sep aŭtoĥtonaj lingvoj de la regiono en la TTT-ejo, afiŝoj kaj T-ĉemizo, krom kompreneble ankaŭ esperanto.

Per la nomŝanĝo de “iberia” al “internacia” la organizantoj celis kaj internaciigi la ĉefe regionan renkontiĝon, kaj pli multe konsideri la ne-esperantistan publikon, kio evidentiĝis en la programo.

Por pli bone konigi la lokan kulturon al la alilandanoj, la organiza teamo preparis montron kaj atelieron pri distingaj lokaj kulturaj trajtoj, i.a. pilota valencia (pilkoludo) kaj albaes (improvizitaj popolkantoj). Komencantoj kaj progresantoj povis ĝui la esperantan preton en kelkaj prelegoj esperantlingvaj, ekzemple pri komputila aŭtomata tradukado esperanten kaj pri monfluo en monda ekonomio. Debatoj kaj atelieroj permesis al ĉiu praktiki la lingvon, diskutante pri minoritataj lingvoj aŭ pri la gramatiko de esperanto. La lokanoj povis partopreni kurson de la rumana, kaj ankaŭ unu el la ĉefaj amuzoj de la renkontiĝo: la koncerto de JoMo. Ĝi okazis en centra placo de la urbo, kie urbanoj mire atentis la koncerton. Li kaj elektronikaj muzikistoj dancigis, saltigis kaj ŝvitigis preskaŭ ĉiun partoprenanton kaj kelkajn lokanojn dum pli ol du horoj.

Tage, responsulo atentis budon kun pluraj libroj, esperantaj kaj lingvorilataj, dum la tuta sabato.

Sabate nokte la esperanta etoso daŭris en trinkejo ĝis ties fermo, por poste iri al la plaĝo spekti stelojn tra teleskopo. Dimanĉe plu daŭris programeroj por stelemuloj, kaj granda grupo iris al la apudurba planetario per buso.

Jen, eksterlandanoj refirmigis sian ŝaton al la marbordo mediteranea, la komencantoj konis pli proksime la esperantan movadon, kaj ĝenerale ĉiuj partoprenintoj jam atendas la sekvan Iberian Renkontiĝon, venontjare laŭvice okazanta en Portugalio.

Luís Batlle

Rekorde malgranda kongreso

Malgraŭ materiaj malhelpoj, la 63a kongreso de SAT-Amikaro (Antonio, 22–25 mar 2008) estiĝis tre kontentiga, kvankam kun rekorde malmultaj aliĝintoj (85). Tamen pli ol 20 aliaj esperantistoj kaj neesperantistoj vizitis la kongreson ĉefe dum la muzikaj vesperoj.

El labora vidpunkto eblis pritrakti kaj antaŭenigi projektojn por pliefikigo de la asocia agado. Al tio aldoniĝis teĥnikaj laborgrupoj por krei pliajn kompetentulojn pri retejmastrumado kaj enpaĝigo. Ni aparte rimarkis junajn fortojn, kiuj deziras engaĝiĝi, tri en la estonta komitato, pluraj en aliaj agadoj.

La kultura programo estis sufiĉe riĉa. Kvar diversstilaj koncertoj (legu la apudan tekston de Flo), prelegoj pri “Kultura valoro de Esperanto” (A. Cherpillod), “Muziko kaj Esperanto” (F. Martorell), debatoj pri “Privatigo de edukejoj” kaj pri “La rolo de edukejoj por kontraŭstari la forpelon eksterlandan de homoj sen legitimiloj”...

La tuttaga ekskurso ne estis tute neŭtrala. Ja, la vizitantoj de la Nacia Muzeo pri Enmigradohistorio kaj de la Vincena Kastelo profitis la okazon por sendi leteron al la prefektejo, demandante: kial malaperis memorplato pri la naŭ oficiroj ĉi tie mortpafitaj post la fino de la Pariza Komunumo...

Du faktoroj ebligis la ĝlatan kaj bonhumoran disvolviĝon de tiuj kvar tagoj. Unue, ni ree (kiel por la lasta SAT-kongreso) ĝuis grandegan helpon de la kultura respondeculo de la restadejo, kiu entuziasmas pri starigo de Esperanto-kurso tie. Kaj due, la ĉeestantoj ne estis klientoj, kiuj venis por ricevi menditan servon, sed komprenemaj kamaradoj.

Vinko Markovo,
Juliette Ternant, Thérèse Pinet

CONCERTS

SAMEDI 22 MARS 20H30 La Kuloj

SAMEDI 22 MARS 22H00 La Pafklik'

DIMANCHE 23 MARS 21H00 Jacques Le Puil

LUNDI 24 MARS 21H00 Double Unu

LUNDI 24 MARS 21H00 ANTONY

RÉSIDENTE JEAN ZAY GRATUIT

Eventoŝ

La muzika kongreso

Kvankam la kongreso de SAT-Amikaro kunigis ĉi-jare nur centon da personoj (kutime estas ĉ. 300), la kongresanoj ĝuis altkvalitan muzikan programon.

Malfermis la artan programon sabate vespere triopo klasika *La Kuloj*, kiu prezentis belajn klasikajn ariojn kaj popolajn muzikojn. Lino Markov gitaristo kaj akordionisto, Klero Ruseto ĉe aldo, kaj Umbajo Majstoroviĉo ĉe hobojo majstre kaj profesie plezurigis la ĉeestantaron.

Post mallonga paŭzo *La Pafklik* en la komenco kun la pariza repulo Cerna de la hiphopa bando *Synaps* malfermis la hiphopan parton de la vespero, kaj ilia gangstera repo esperantista ne timigis kelkajn malpli junajn gesinjorojn... La repo de *La Pafklik* vere efikas, kaj se esperantistoj ne komprenas ilian humuron, kiam ili kantas: “Ni lernis esperanton nur por insulti vin”, aŭ “Esperanto estas mafio”, aŭ “Mi aliĝas al polico”, do tiam necesos reeduki esperantistojn je acidaj kaj polemike provokaj versoj... *La Pafklik* nun preparas propran repaŭn albumon...

La dimanĉa spektaklo kun Ĵak Le Puil estis tenera kaj humura, kvankam Armela la edzino de Ĵak suferis la antaŭan tagon krurrompiĝon kaj estis enhospitaligita.

Ĵak prezentis al la publiko la repertuaron de la disko *Mi estas*, kiun pluraj ĉeestantoj kunkantis, kaj tute novajn kantojn... La spektaklo estis sukcesa kaj homoj volis pli... Ĵak revenis trifoje rekanti post bisa aplaŭda tumulto... Barda franca stila kanzono eĉ en esperanto plaĉas al la francoj...

La surprizo venis lunde vespere kun *Duoble Unu*, kiun nur malmultaj esperantistoj konas. *Duoble Unu* vojaĝigis la kongresanaron tra la mondo kvazaŭ en muzika teatro.

Ili talente ĉarmis la publikon per diversstila popolmuzika repertuaro en esperanto kaj en aliaj lingvoj... Ilia spektaklo ŝajnis mallonga, kvankam ĝi preskaŭ dum du horoj tenis la spektantojn... Multaj emocioj trakuradis dum la spektaklo, ridoj kaj tristo alternis... Infankantoj kaj tre gravaj kaj seriozaj temoj...

Komprenoble ili prezentis la novan diskon *Sen lim ĝis*... kaj mi rekomendas al tiuj kiuj jam havas la diskon viziti ilian spektaklon ... Estas vere komplemanta plezuro!

Kongresumadis muzike por vi

Flo!



Interlingvistikaj Studoj en UAM

En 1998 komencis siajn studojn pri interlingvistiko la unua grupo en la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznań, Pollando), kaj ĉi-jare en septembro finos siajn studojn la tria grupo. La postdiplomaj studoj kun sia ekstera formo (du intensaj semajnoj en ĉiuj 3 jaroj) altiras partoprenantojn el multaj landoj: la lastan grupon konsistigis komence 26 gestudentoj el 13 landoj de Pollando kaj Germanio ĝis Japanio kaj Irano. La multnacia partoprenantaro nature kontribuas al la interkulturaj kaj kontrastaj studoj.

La postdiploma studado donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas internaciajn lingvojn kaj planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruistaj trejnadado. Al tio kontribuas ankaŭ la kunlaboro kun ILEI dum la lasta studjaro. Pro sia komplekseco la studoj estas unikaj.

La instruistaro same estas internacia: mem la surloka stabo: Michael Farris, lingvisto; Bradio Moro, interlingvisto; Zbigniew Galor, sociologo; kaj Ilona Koutny, la fondinto kaj gvidanto de la Studoj. Polaj fakuloj estas engaĝitaj kiel Maria Majerczak, metodikistino el la Jagielona Universitato (Krakovo), poetino Lidia Ligeża kaj literaturisto Tomasz Chmielik. Enkadre de la Studoj gvidas kursojn elstaraj esperantologoj: Vera Barandovska-Frank, Vilmos Benzczik, Detlev Blanke, Michel Duc Goninaz, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Aleksander Melnikov,

Humphrey Tonkin, Blazio Vaha kaj John Wells. Kelkaj el ili prezentas prelegon ankaŭ al neesperantistaj kolegoj.

13-17 sep 2008 denove eblos komenci la studojn. Ni atendas kandidatojn, kiuj jam bone parolas la lingvon kaj havas universitatan diplomon. La stipendioj de ESF ebligas partoprenon de kelkaj gestudentoj kiel ĝis nun. Eblas aliĝi ankaŭ al la paralela unujara instruista trejnadado de UAM-ILEI.

La Interlingvistikaj Studoj festos sian dek-jariĝon 18-19 sep per solena interlingvistika simpozio. La apero de la unua lernolibro de la studoj estas planata por la aranĝo. Ni bonvenigas ankaŭ ĉiujn interesiĝantojn por la abunda programo, kiun eblas ligi kun la posta kultura aranĝo Arkones (19-21 sep), same en Poznań.

Informoj: interlin@amu.edu.pl.

Ilona Koutny

Internacie kaj interkulture

4-6 apr 2008 en hungara urbo Miskolc okazis internacia renkontiĝo laŭ invito de la esperantistaj geedzoj Adrienne kaj László Pásztor. Universitato de la tria aĝo el Nowy Sącz kaj Halina Komar (prezidantino de PEA) okazigis partoprenon de poloj.

Ni vizitis la urbon Abaujszántó, kie troviĝas muzeo de Kálmán Kalocsay — eminenta esperantista verkisto, kiu naskiĝis en tiu loko.

Ni vizitis ankaŭ la urbon Miskolc kaj renkontiĝis kun la honoraj prezidantoj de HEA d-ro Endre Dudich kaj d-ro György Nanovfszky. Krome okazis vizitado de vinkeloj kun vingustumado, banado en la terma kaj grotbanejo, vespermanĝo kun cigana muziko, danco kaj kantado en la pola, hungara kaj Esperanto.

Magdalena Tatara

Denove en la Paraiba Valo

Pli ol 80 samideanoj el diversaj urboj de Brazilo kunvenis la lastan martan dimanĉon en la Jura Fakultato de la Universitato UNIVAP en la urbo São José dos Campos, ŝtato São Paulo, okaze de la 71a Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba Valo.

En tre komforta ejo de la Fakultato, la vicrektoro, prof-ino Fátima Manfredini, salutis la ĉeestantojn kaj informis, ke ŝi intencas lerni Esperanton.

12-persona teamo de lokaj aktivuloj, sub la gvido de Eni Oliveira, fervore kaj kompetente preparis komputilajn prezentojn, sonaparatojn, dokumentajn tekojn, libroservon kaj... bongustajn lunĉojn.

Altnivele prelegis: Isis Pitton (Psikologio: infanoj antaŭ funebro); Guilherme Jardim (Instruado de Esperanto al infanoj); José Progiante (Filozofio: la pluraj signifoj de Amo); James Pitton (Esperanto-historio: partopreno de Zamenhof en Universalaj Kongresoj); José Tenório (ILEI kaj eblecoj de lernado per interreto); Osmar Alves (Flago-scienso).

Ensemblo *Hilário Martins* prezentis originalajn ciganstilajn komponaĵojn.

Oni anoncis, ke la sekva Renkonto okazos en la urbo Três Rios, ŝtato Rio, 17-18 maj 2008 kune kun la ŝtata kongreso.

Paulo Sérgio Viana

UK en Moskvo: la granda esploro

La Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller planas en la dua duono de majo viziti Moskvon. La celo de la vizito estas esplori la pretecon de la urbo por akcepti Universalan Kongreson de UEA. Interalie estas planata lia renkontiĝo kun vicurbestro de Moskvo pri turismo kaj kulturaj rilatoj.

Moskvo estas rigardata kiel rezerva varianto por UK-2010, la ĉefa kandidato por kiu estas Kubo. Tamen, konsiderante ne tre klaran politikan kaj ekonomian situacion de la insulo, UEA eble sentus sin pli komforta havante plian varianton.

Multo ankaŭ dependus de la financa subteno por la aranĝo, kiun pretus disponigi Moskva registaro. Ja sendube Moskvo estas tre multekosta urbo, ne nur vidpunkte de rusianoj. Sen tre malavara subteno (laŭvorte jam antaŭpromesita) UK en Moskvo estus preze malloga kaj sekve finance malgajna.

Andrej Grigorjevskij

Laŭ *Esperanto-rus-informoj*

ICH: Interlingvistika sesio

Interlingvistiko estas unu el la fakoj instruataj en la klerigesioj en Interkultura Centro Herzberg / Germana Esperanto-Centro. Studado de Esperanto-literaturo, gramatiko, historio, specifoj de Esperanto-kulturo kaj movadaj konoj, argumentado, varbado, teorio kaj praktiko de metodiko de lingvoinstruado apartenas al la kompleksa oferto por studemuloj.

La partoprenantoj en la 37a Studsesio komence de aprilo en la Esperanto-urbo Herzberg kun granda intereso aŭskultis la fakprelegojn de d-ro sc. Detlev Blanke pri:

- Tipologio de planlingvoj kaj la aktuala internacia stato;
- Esperanto kiel faklingvo;
- Problemoj de tradukado kaj interpretado.

La prelegojn sekvis viglaj diskutoj, kaj ankaŭ tio estas grava parto de la klerigado, ja oni lernas, kiel argumenti, kiel esprimi sin en diversaj faktemoj.

D-ro Blanke kontribuis ankaŭ al la vesperaj programoj. La foto-prezentado kaj la interesaj personaj rakontoj pri lia vizito al *Bona Espero* (Brazilo) verŝajne longe restos en la memoro de la aŭskultantoj.

Alia interesa programero estis la vinseminario de unu el la seminarianoj, Johannes Müller, kiu mirigis ĉiujn per siaj konoj pri viproduktado. Kompreneble la posta gustumado de diversaj francaj vinoj kreis bonegan etoson.

Al la semajnfina klerigado estis aldonitaj ankaŭ praktikaj metodikaj konoj kun diskutoj sub la gvido de Zsófia Kóródy: kiel instrui ludante, kiel plilarĝigi la vortprovizon. Peter Zilvar enkondukis al Esperanto-kulturo.

La sekva studsesio okazos en julio, dum la Kultur-Turisma Semajno (11–19 jul 2008) en internacia rondo kun partoprenantoj el pli ol 15 landoj. Bonvenon!

Zsófia Kóródy

Escepta reklamo de *Espero*

5 apr la peterburga radio dissendis 30-minutan intervjuon kun la prezidanto de la societo *Espero* Anna Butkeviĉ. Ĝi estis la deka programero el la priesperanta ciklo, lanĉita de la ĉefa peterburga radiostacio pasintsomere. Ankaŭ post tiu ĉi programero ni atendas aperon de novaj lernantoj, des pli ke lastfoje estis menciita la adreso de *Espero* (do, fakte oni faris escepton por *Espero* kaj permesis ĝian kaŝitan reklamon).

Boris Kondratjev



Per Esperanto eŭropanino instruas korean kulturajn al afrikanoj

Burundio: du sinsekvaj seminarioj

Du seminarioj okazis sinsekve en Rumonge (Burundio). Dum la unua (22–29 mar) oni plejparte lernis Esperanton. Krom la kurso mem laŭ *Gerda Malaperis* de Piron, okazis prelegoj pri Esperanto en la mondo kaj en Afriko, pri la vivo de Zamenhof k.a.

Fine de la unua seminario venis Klarita Velikova — prezidanto de Monda Esperanta Ligo por Sporto (MELS). Ŝi sukcesis kunludi en futbalmatĉo, en kiu ĉio estis Esperanta: piedpilkantoj, juĝistoj kaj spektantoj. Post la ludo seminarioj kaj anoj de la teamo *Esperanto FC* iris al la lernejo, kie estis disdonitaj diplomoj kun muziko kaj trinkado.

La duan seminarion (30 mar – 11 apr) gvidis Klarita Velikova, kiu dum sia naŭjara loĝado en Suda Koreio fariĝis la unua eksterlanda majstro de la 3a “Dan”, juĝisto kaj licencita instruisto de Tekkĵono kaj ora medalisto en la 1a Nacia Konkurso de Virina Tekkĵono-Federacio (decembro 2005).

Dum la seminario 156 junuloj akiris la bazajn paŝojn de la korea tradicia luktoarto Tekkĵono. Dum du semajnoj ili lernis ekzercojn, kiuj estas lernataj kutime dum kvar-monata periodo.

La ideo de Klarita Velikova estas, ke per sporto oni povas disvastigi Esperanton. Kaj per Esperanto oni povas alporti kaj elporti sportan kulturajn. Vidu: Tekkĵono estas korea kulturo. Klarita estas bulgara virino. Burundio estas en Afriko. Sed per Esperanto eŭropanino unuafoje montris Tekkĵonon al Afriko.

La Tekkĵono-trejnado estas parto de la Esperanta Eduka Projekto por Sporto

kaj Kulturo en Burundio, iniciatita de MELS. La projekto komenciĝis pasintjare, kiam MELSanoj subtenis la burundian futbalteamon *Esperanto FC* per aĉeto de diversaj sportaj necesajoj por ĝia partopreno dum la futbalsezonoj.

Klarita Velikova kaj la gvidantoj de Esperanto-Asocio de Burundio renkontiĝis kun la urbestro kaj poliestro de Rumonge kaj kun altrangaj figuroj en la Ministrejo pri junularo, sporto kaj kulturo, inkluzive de la ministro mem. Ili ĉiuj aprobis la projekton kaj promesis helpi la novajn agadojn de la burundiaj junuloj kaj larĝigon de la internaciaj kulturaj rilatoj kun aliaj popoloj. Naskiĝis ideo pri Esperanto-kurso por membroj de la Ministrejo, kiuj esprimis interese lerni la internacian lingvon.

Hassano Ntahonsigaye

AEI oficiale agnoskita

Jean Jacques Nyenimigabo, ministro pri junularo, sporto kaj kulturo, 21 mar oficiale agnoskis Afrikan Esperanto-Instituton en Bujumburo, la ĉefurbo de Burundio. La agnosko estis petita en januaro, tuj post la inaŭguro de AEI, fare de la Konsulo de la Esperanta Civito.

AEI estas instanco de Societo Internacia por la Paco Universala SIPU, tute sendependa de la ŝtato. Ĝia direktoro estas Martin Mbazumutima; la prezidanto de SIPU estas Frederiko Nimubona. SIPU organizis kun KCE la duan Afrikan Esperantologian Semajnon. De KCE iras libroj kaj alia materialo al Bujumburo por AEI. SIPU aliĝis al la Pakto por la Esperanta Civito en 2006.

HeKo

Unufraze

★ UEA kunlabore kun la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj k kun la NRO-kontaktiga oficejo de la Ĝeneva Oficejo de UN organizos 24 apr en Ĝenevo simpozion *Lingvaj rajtoj en la mondo: la aktuala stato*. (Renato Corsetti)

★ Angla, ĉina, franca, hispana k Eo estas la kvin subtitolaj lingvoj de la propaganda klipo *Yes, we can* de Barack Huseyn Obama konkuranta kun Hillary Clinton por kandidati al la prezidenteco de Usono. (*Heroldo de Esperanto*)

★ 15 feb en Bostono E-istoj José Antonio Vergara k Humphrey Tonkin prelegis en la jarkunveno de la Amerika Asocio por Antaŭenigo de la Scienco, dediĉita al lingva malegaleco en la scienco. (*Esperanto USA*)

★ Vinko Ošlak, prezidanto de la Ea PEN-Centro, fine de marto partoprenis per referaĵo en la Internacia Konferenco de PEN Internacia (Bled, Slovenio) k reprezentis la E-Centron en la kunveno de la verkistara pac-komitato. (HeKo)

★ 4 apr 2008 la pollanda konsulejo en München okazigis informkunvenon “Esperanto lingvo de kulturo” lige kun la Jaro de Interkultura Dialogo k Monda Jaro de Lingvoj. (Alicja Lewanderska)

★ 29 feb Seatla E-Societo denove kondukis klasojn kadre de *World Languages Day* ĉe la Universitato de Vaŝingtonio en Seatlo; tri 50-minitajn E-sesiojn partoprenis entute 55 studentoj; dum la tuta tago funkciis E-budo en la Kultura Foiro. (*Esperanto USA*)

★ La estraro de TEJO decidis ke la taskon de organizado de IJK en 2009 havas la Ĉeĥa E-Junularo, kune kun Germana k Pola E-Junularoj; ĝi okazos 18–25 jul 2009 en Liberec, Ĉeĥio. (Vildana Delalić)

★ La Estraro de Ligo de Samseksemaj E-istoj, pro malbona sorto de gejoj en Pollando, malrekomendis al siaj membroj viziti Pollandon okaze de la UK en Bjaliŝtoko en 2009. (*Heroldo de Esperanto*)

★ La estraro de Eŭropa E-Unio akceptis kiel membron de EEU Slovenian Asocion de Societoj por la Internacia Lingvo, dum Slovenia E-Ligo neniam aliĝis, k ties prezidanto deklaris ke ĝi ne intencas aliĝi al EEU. (*Eŭropa Bulteno*)

★ *Internaciisto*, la organo de Kolektivo E-ista Komunista, ĉi-jare aperas ne plu dumonate, sed nur trimonate pro pasiveco de la membraro. (*Internaciisto*)



LF-2 en Peterburgo: Arĵaana Sjurjun prezentas la tuvan lingvon (*Fotis Sergej Andrejsons*)

LF: Minoritataj lingvoj furoris

“La 13an de aprilo mi pasigis bonegan dimanĉon inter interesaj homoj. Mi dankas la organizantojn, la prezentantojn kaj la publikon”, — skribas siajn impresojn juna esploristo de la tjurkaj lingvoj de Siberio, Arĵaana Sjurjun, la unuan fojon partopreninta lingvan festivalon.

Jam la dua Lingva Festivalo okazis en Sankt-Peterburgo, kaj ĝi iĝis pli granda kaj pli sukcesa, ol la pasint-jara. Ĉirkaŭ ducent personoj partoprenis la eventon, inter ili ankaŭ gastoj el Moskvo kaj Ijevsko. La ĉi-jara festivalo aparte elstaris pro la prezentoj de malpli disvastiĝintaj lingvoj de ruslanda Nordo kaj Siberio: la ĉukĉa, la neneca, la tofalaraj kaj la tuva.

Laŭ la ne tre preciza enketado (nur proksimume duono de la ĉeestintoj plenigis la enketilojn), la plej popularaj prezentoj estis de la lingvoj oseta (32,81% de la enketiloj mencias ĝin kiel vizititan), tokipono (29,69%), la japana (28,13%), la kpelea lingvo el la Okcidenta Afriko (26,56%), la hindia (25%), Esperanto (23,44%) kaj (po 20,31%) la belorusa, la baltaj finnaj lingvoj de Ingrio (regiono, kie Peterburgo lokiĝas) kaj la erzja.

Evidente vizitantoj ĉi-foje aspiris en la festivalo konatiĝon kun “ekzotikaj” lingvoj, preskaŭ ne vizitante prezentantojn, ekzemple, de la franca aŭ la germana. La angla lingvo ĉi-jare ne estis prezentita, ĉar lastmomente ne sukcesis veni ĝia prezentanto.

Inter la 35 prezentitaj lingvoj la publiko plej ŝatis prezentantojn de la lingvoj nogaja, antikva persa, itala, jida, kpelea, la ingriaj finnaj lingvoj kaj toki-

pono (pli ol duono de la vizitintoj menciis tiujn prezentantojn kiel plej impresajn). Plurajn laŭdajn menciojn meritis ankaŭ Esperanto, kiu estis bone elstarigita, kvankam ne trudata.

Dum la festivalo estis filmite multe da video-materialo, surbaze de kiu estas kompilota dokumenta filmo. Tia filmo povus iĝi tre bona memoraĵo pri la festivalo, okazinta en la Internacia Jaro de Lingvoj.

Slavik Ivanov

Esperanto-radio populara en Rio

La plej lasta bulteno de la opinionda entrepreno IBOPE sciigas, ke la programo *Esperanto, a Lingua da Fraternalidade* (Esperanto, la lingvo de frateco), de *Radio Rio de Janeiro*, vicas en la tria loko inter ĉiuj mezondaj stacioj de la metropola regiono de Rio. La ciferoj rilatas al la trimonato oktobro-decembro 2007. Tio signifas la plej grandan aŭskultantaron en la historio de la programo, kreita antaŭ 21 jaroj.

Tio montras, ke en la posttagmezaj mardoj, kiam la programo estas elsendata samtempe al ĝia produktado, ĝin sekvas 12859 aŭskultantoj po minuto.



Givanildo Costa sur posteno

Laŭ la programestro, Givanildo Costa, tio montras la trafecon de la strategio kaj en la formato kaj en la prezentado de la programo. Oni elektis popolan stilon, laŭ kiu Esperanto estas dinamike, simple kaj junece pritraktata, kun instigo al la partopreno de aŭskultantoj. Givanildo Costa reliefigas ankaŭ la kvaliton de ĝia produktanta skipo, kiu kalkulas je la voĉo de Joel Manso, unu el la legendoj de la brazila esperantista radio, krom Renaud Hetmanek, Julieta Dulce kaj Fabiano Henrique.

La bona kvanto de aŭskultantaro ripetiĝas ankaŭ en la vesperoj de vendredo, kiam registritaj programoj estas ree elsendataj. Je la 23-a horo, *Radio Rio de Janeiro* troviĝas en la kvara loko, kun 6324 aŭskultantoj po minuto.

Fabiano Henrique

Kiu devas esti ĝenita?

Reago je revuaj tekstoj povas esti ankaŭ tia, kiu trafis mian artikolon *En Pollando, do nenie?* en la januara *Ondo*. Kelkaj legantoj opinias, ke pro ĝi mi devas esti senprofunde ĝenita, same kiel la redakcio de *La Ondo*. Tute male traktas la komentariojn aliaj, kiel Jerzy Marian, kiuj vidas en la teksto veran priskribon de la pasinta tempo. Do, tion, kion mi intencis skribi.

Jen unu el la legantoj terurigitaj far mia artikolo, kiu subskribiĝis modeste “Zorgopense, Romuald Skaliński, prezidanto de E.S. FLAMO en Toruń kaj ni ĉiuj”. Li sendis helikpoŝte preskaŭ dupaĝan manskribitan leteron al mia hejma adreso! En ĝi estis opinio ne nur lia propra, sed — laŭ lia deklaro — ankaŭ tiu de lia grupo. La titolo de la artikolo, petita ĉe mi far la redakcio de *La Ondo*, aperis sen demandosigno. Tamen, eĉ se ĝi estus tie, tio certe ne ŝanĝus la opiniojn pri la teksto kaj la aŭtoro. Laŭ ili mi estas: “homo konscie prikraĉanta sian landon kaj sian nacion” (M. Łaba en *LOdE*, 2008, №2); “tiu, kiu damaĝas al la pola ŝtato, al la civitanoj de la ŝtato, al Esperantismo, ĉi kaze ankaŭ” (R. Skaliński nome de *Flamo*). Ambaŭ opinioj atestas, ke tiuj ĉi legantoj pensas per emocioj. Do, reale kiu devas esti ĝenita?

Ĉu ĝenita devas esti mi — la aŭtoro de la teksto? Laŭ la priskriboj: malsimpatia ideologia antagonisto, kiu malrespektas la naciajn heroojn, misfamigas imitindajn idealojn; troviĝanta (same, kiel Pollando) nenie, pro tio ne scianta kiu li estas, senkaŭze malhonoriganta polajn naciajn gravulojn de la pasinto kaj de la nuno kaj pro tio ne komprenanta, ke ne tia estas Esperanta kulturo, ne memoranta, ke laŭ la Bulonja Deklaracio kaj la tuta E-filozofio oni ne rajtas uzi Esperanton por damaĝaj kontraŭŝtataj kaj kontraŭcivitanaĵoj, mi farante tion, perdis mian E-aktivulan kaj instruistan reputacion.

Ĉu ĝenita devas esti la redakcio de *La Ondo*? Laŭ tiuj ĉi legantoj la publikigo de la teksto estas afero trista kaj skandala, por polaj legantoj aĉaĵo sentata kiel kontraŭnacia rankoro; la redakcia “komplezo” misfamigi Pollandon.

Ĉu ĝenitaj devas esti tamen la aŭtoroj de la reagoj? Ili — amantoj de fritajo el glaciaĵoj — emocie nuligantaj kontraŭdirojn de reala mondo, en kiu la loko de esperanto ne estas donita unu foje por ĉiam. Ili — defendantoj de ŝtata ordo sendepende de ĝiaj konsekvencoj por civitanoj kaj por esperantistoj, koste eĉ de vereco de bazaj faktoj el la historio de esperanto.

Al valoraj ideologioj de esperanto-movado apartenas malaprobado uzi esperanton por damaĝi homojn pro ilia ŝtatanececo kaj civitaneco (pri tiu “damaĝo” temis en mia teksto). Kontraŭ sugestoj de sinjoroj Łaba kaj Skaliński kaj la grupo *Flamo*, la Bulonja Deklaracio, en la tria artikolo, traktas uzadon de la lingvo tute alie. Ĝi diras, ke “ĉiu deziranto povas ... uzadi la lingvon por ĉiuj eblaj celoj”. Tamen sinjoroj Łaba kaj Skaliński la Bulonjan Deklaracion reduktas al sia falsa imago pri ĝi. Iliaj reagoj ankaŭ atestas, ke por ili ne havas signifon kontraŭdiroj inter ŝtat-civitana kaj esperantista identecoj. Ankaŭ tiam, kiam la politiko de la aktuala ŝtata estraro evidente ofendas interesojn de la E-movado, kiel en la periodo karakterizita en mia komentario (al kiu apartenas la fermo de la E-redakcio de Radio Polonia), tiam proponataj far sinjoroj-esperantistoj Łaba kaj Skaliński manieroj: prisilenti, ĉar tio ĝenas, ne tuŝi ... ne vidi, ktp. estus, laŭ la proverbo, kiel medikamentoj por ... mortinto.

Zbigniew Galor (Pollando)

Por ĉiusemajnaj podkasto

Kun granda plezuro mi aŭskultis vian trian podkaston, kaj mi ĝin trovis tre interesa. Kiel en la antaŭaj elsendoj, mi konstatas, ke viaj prononcoj estas perfektaj, kaj la disaŭdigo estas bonega. Vera muziko de la vortoj! Sincerajn gratulojn!

Mi speciale dankas s-ron Aleksander Korĵenkov pro la mencio, koncerne min mem, kiun li afable aldonis fine de tiu elsendo. Estas tute normale ke mi subtenu vian altkvalitan revuon kaj vian laŭdindan laboron... Post kelkaj tagoj mi denove sendos al *La Ondo* monsubtenon per internacia poŝtmandato.

Estus agrable, se viaj podkasto povus esti aŭdeblaj ĉiusemajne, sed mi tute konscias, ke nuntempe tio estas malfacila. Tamen, kiel multnombraj aŭskultantoj, mi esperas, ke tiu plezuro baldaŭ efektiviĝos.

Roger Siarri (Korsiko, Francio)

Per kalendaroj tra la mondo

Esperanto estas tre utila por kolekti aĵojn el la tuta mondo. Dum la lastaj dek jaroj mi kolektas kalendarojn el la tuta mondo, kaj ekde la lasta majo ĉiumonaton mi montras tiumonatajn bildojn sur la kalendaroj en la najbara poŝtoficejo.

Laŭ landoj pejzaĝoj tute malsamaj eĉ en la sama monato. Vizitantoj de la poŝtoficejo havas intereson pri la kalendaroj, kaj iuj volas aĉeti, iuj konfesas, ke ili unuan fojon vidas eksterlandajn kalendarojn ktp. Dume du homoj esperantistiĝis.

Poŝtoficeja estro tre bonvenigas la ekspozicion, ĉar sen ĝi li ne povas ornamati la aviztabulon bele.

Hori Yasuo (Japanio)

Internacia Esperanto-Konferenco – 2008 en Slovenio, 12–18 jul 2008

Ŝempeter pri Gorici / Ŝempeter ĉe (Nova) Gorica

Temo: Fernando DE DIEGO, vivo kaj verkaro

Organizanto: *Orbis Pictus* de Viŝnja Branković, ☐ Via Parini 5, 34129 Trieste, Italio ☎/fax +39/040 767875 ✉ orbispictus@iol.it

Konstanta adreso: Éric Laubacher, kasisto de OSIEK ☐ 1, rue de Bougainville, 78180 Montigny le Bretonneux, Francio ☎ +33 1 30 96 67 91 ✉ kasisto@osiek.org

inter Ljubljana (100 km) kaj Venecio (150 km)

en regiono de najbarurboj Nova Gorica (Slovenio) kaj Gorizia (Italio) proksime al maro kaj montaro, mondfamaj grotoj...



Ĉiutagaj prelegoj sekvataj de debatoj. Libroservo Suspensa voĉdonado por OSIEK-premio 2008

bona internacia etoso de negranda aranĝo • favoraj kondiĉoj kaj prezoj • allogaj proksimaj ekskursoj posttagmezaj ekskursetoj dum la konferenco

Postkonferencaj ekskursoj (dum tri tagoj) aŭ/kaj kunvojaĝo al 93a UK en Roterdamo! VI ESTU BONVENA!



La eŭropministro de la germana regiono Hessen prezentas la deklaron al Komisionano Orban (Foto: Registraro de Hessen).

Denove batalo por la germana

de Dafydd ab Iago el Bruselo

En aprilo, denove estis batalo por la germana kiel oficiala kaj privilegiata lingvo de la Eŭropa Unio (EU).

Grupo de 46 germanlingvaj membroj de la Eŭropa Parlamento kune kun 18 regionoj prezentis petskribon al la respondeculo pri multlingvismo Leonard Orban. La germanlingvaj politikistoj petas, ke la germana havu egalan statuson kune kun la angla kaj franca kiel “EU-lingvo de administrado”.

Kvankam la ideo pri “lingvo de administrado” nenie ekzistas en la traktatoj pri EU, la franca kaj angla estas delonge uzataj kiel “internaj lingvoj” de la eŭropaj instancoj, kaj eĉ sola interna lingvo de la Eŭropa Kortumo en Luksemburgo. Praktike, ĉi tiu koncepto de “internaj lingvoj” signifas, ke internaj dokumentoj povas esti skribitaj de funkciuloj en la angla kaj teorie ankaŭ en la franca. Tamen lastatempe la nombro de dokumentoj de la Eŭropa Komisiono originale skribitaj angle superis 90% laŭ statistikoj pri tradukado. Fronte al la superregado de la angla, germanaj politikistoj jam longe provas “denove” starigi la germanan kiel superregan lingvon kune kun la angla kaj franca.

La deklaro de la germanlingvaj regionoj kaj deputitoj, prezentita al Orban en Bruselo, enhavas multon subskribindan. Ekzemple, la deklaro tekstas: “Por ekhavi sukcesan enligadon de homoj, nepras alparoli ilin en ilia propra lingvo. Se granda parto de la homoj ne povas informiĝi pri Eŭropo, tiam la oferto de dialogo sekvas al nenio”.

Malantaŭ la iniciato estis la eŭropministro de la germana regiono Hessen Volker Hoff, kiu prezentis la deklaron al Komisionano Orban. “En la tuta Eŭropo preskaŭ 100 milionoj da homoj parolas la germanan kiel la gepatran lingvon, —

diris Hoff. — Se la Komisiono seriozas pri siaj planoj por Eŭropo de Civitanoj, tiam ĝi devas ne plu malfavorigi la germanan lingvon publikigante, ekzemple, dokumentojn kaj retejojn nur en la angla kaj franca, kaj ne en la germana. Se ĝi vere volas, ke civitanoj aktive partoprenu en la politika vivo de Eŭropo, tiam ĝi devas disponigi la necesajn informojn propralingve al ili”.

La ministro el Hessen aldonis alian pli materian kialon. “Speciale por Hessen, kun granda eksportekonomio, multe gravas la lingva demando”, — diris Hoff. Li notis, ke malgrandaj firmaoj en ĉi tiu regiono povas esti malfavorigitaj pro la fakto, ke ili ne ricevas informojn kaj komercproponojn de la eŭropaj instancoj en la germana.

Laŭ Pietro Petrucci, preparolanto de la Eŭropa Komisiono, la germana petskribo adresiĝis al ĉiuj eŭropaj instancoj, ne nur al la Eŭropa Komisiono. Substrekante la privilegiitan statuson de la germana kiel de unu el la tri “internaj” EU-lingvoj, Petrucci bonvenigis la iniciaton kiel li bonvenigus “iujn ajn iniciatojn por promocii lingvojn”. Tamen pro tio, ke la germana jam estas egaltraktata kun aliaj lingvoj, Petrucci, intervjuita de la novaĵservo *Euractiv*, ne vidis la neceson uzi “aldonajn” rimedojn. Laŭ la Komisiono, diskutoj pri lingva politiko “daŭras”, kaj ankoraŭ ne validas la nova Eŭropa Traktato. “Ni atendu kaj vidu”, — diris Petrucci.

Nombroj sen komentoj

Malgaja listo

Laŭ raporto de *Amnesty International*, en 2007 estis ekzekutitaj ne malpli ol 1252 personoj en 24 landoj — iom malpli ol en 2006, kiam AI ricevis informojn pri almenaŭ 1591 ekzekutitoj en 25 landoj. Plej multaj ekzekutoj okazis en Ĉinio (470), Irano (317), Saud-Arabio (143), Pakistano (135) kaj Usono (42). En ĉi tiuj kvin landoj okazis 88% de ĉiuj konataj ekzekutoj en la mondo.

Oni ne ŝatas gastigi en Ruslando

Malgraŭ la ekzekutoj Ĉinio kaj Usono estas turismaj landoj, sed Ruslando, en kiu ekzekutoj kaj mortkondamnoj ne okazas, ne logas turistojn. En 2007 Ruslandon vizitis nur 2,2 mln da eksterlandaj turistoj — je 9% malpli ol en 2006. La nepopulareco kaŭzas ne manko de intereso, sed ĉefe vizaj proceduroj kaj altaj porturistaj prezoj en la du ĉefaj ruslandaj urboj: Moskvo kaj Peterburgo.

... sed oni alte taksas Ruslandon

Internacia opinionda kompanio *GlobeScan* la kvaran fojon esploris en 34 landoj de la mondo la opinion pri la rolo de 14 plej gravaj landoj (inkluzive de EU). Laŭ ĉi tiu esploro la nombro de tiuj, kiuj opinias, ke Ruslando havas pozitivan rolon en la mondo unufoje superis la nombron da tiuj, kiuj opinias ĝian rolon negativa.

Plej alte oni taksas la rolon de Germanio: 56% pozitive kaj 18% negative (la ceteraj donis aliajn respondojn). Sekvas: Japanio (56% / 21%), Eŭropa Unio (52% / 21%), Francio (50% / 22%), Britio (50% / 24%), Brazilo (44% / 23%), Ĉinio (47% / 32%), Barato (41% / 28%), Ruslando (37% / 33%). Pri la ceteraj “potencoj” dominas negativaj opinioj: Usono (35% / 47%), Norda Koreio (23% / 44%), Pakistano (18% / 50%), Israelo (19% / 52), Irano (20% / 54%).

RADIO

Radio Esperanto

Halina kaj Aleksander
parolas el Kaliningrado

Podkasta servo de La Ondo

Aŭskultu: <http://la-ondo.rpod.ru>

ESPERANTO

Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (7)

stereofoni/o. Sontekniko, kiu uzas du kanalojn por aŭdigi sonon, kaj kiu tiel kapablas krei impreson de multaj dise situantaj sonfontoj.

stir/i. Direkti moviĝadon de veturilo: *stiri aŭton; stiri ŝipon; stiri biciklon; stiri aviadilon.*

stok/o 1 disponebla kvanto da varoj, krudmaterialoj aŭ fabrikitaĵoj (tenata en provizejo). **2** (figure) Provizo, kolekto (de io havebla por uzo): *vortostoko* (= vortprovizo); *ŝi havas grandan stokon da ŝercoj.* **stok/i.** Teni en stoko; amasigi en stoko; aldoni al stoko: *stoki varojn; stoki manĝaĵojn; stokata varo* (= varo tenata en stoko/metata en stokon); *stokita varo* (= varo metita en stokon).

strangol/i. Sufoki per premo de la gorĝo: *strangoli homon; strangoli beston.*

sugest/i 1 Prezenti, proponi (seninsiste) ideon por konsidero: *mi sugestas, ke ni faru jene; sugesti solvon; sugesti respondon.* **2** Kaŭzi aperon de ideo, pensigi: *la simptomoj sugestas, ke li havas malarion; ŝia esprimo sugestis, ke ŝi estas kolera; la flugado de la birdoj sugestis novan ideon por flugmaŝino.*

ŝalt/i. Ekfunkciigi aparaton per tiucela regilo (ŝaltilo), precipe tiel ke ĝi komencu produkti sonon, lumon, varmon, akvon ktp. (la gramatika objekto povas indiki la aparaton aŭ la produktatan efikon): *ŝalti televidilon; ŝalti komputilon; ŝalti sonon; ŝalti lumon; ŝalti elektron.* **mal/ŝalt/i.** Ĉesigi funkciadon de aparato per tiucela regilo (ŝaltilo). **ŝalt/il/o.** Arangaĵo por ŝalti aŭ malŝalti: *baskula ŝaltilo; buton-ŝaltilo.*

ŝenopraz/o. Spicherbo parenca al cepo kaj ajlo, kun blankaj floroj kaj longaj tubformaj folioj uzataj pro sia aromo en salato kaj aliaj manĝaĵoj. (*Allium schoenoprasum.*)

ŝok/i. Forte kaj malagrabla surprizi aŭ ĉagreni: *lia konduto ŝokis min; la novaĵo ŝokis ŝin.* **ŝok/o 1** Ago ŝoki kaj ties rezulto. **2** (en medicino) Stato de korpa malforteco karakterizata de nenormale malgranda aktivado de la koro, pulmoj ktp. (pro difekto al la korpo aŭ pro ekstrema malagrabla sperto).

ŝtorm/o. Fortega vento, ofte akompanata de pluvego aŭ neĝo, malpli forta ol tempesto.

taksi/o. Aŭto, kiu kune kun ŝoforo estas luebla por veturado, normale provizita per aparato, kiu montras la ŝuldatan veturpagon en ĉiu momento.

tank/o. Kirasita batalveturilo, kiu moviĝas sur ĉenbendoj (raŭpoj).

tapir/o. Porkosimila mamulo el la ordo de neparhufuloj, kun dikaj kruroj, mallonga vosto kaj mallonga movebla

Ade

rostro, vivanta en suda Azio kaj Sud-Ameriko. (*Tapirus.*)

telepati/o. Komunikigo inter mensoj per aliaj rimedoj ol la ordinaraj sensoj: *la ekzisto de telepatio ne estas science pruvita.*

tenis/o. Sporto, en kiu du ludantoj (aŭ du paroj da ludantoj) per rakedoj alterne batas kaj rebatas pilketon trans reton streĉitan inter la ludantoj. **tabl/o/tenis/o.** Tenisosimila ludo sur speciala tablo, en kiu oni uzas lignajn batilojn kaj tre malpezan plastan pilketon.

test/o. Ekzameno, mezurado aŭ enketito por kontroli ion (ekz. nivelon de lernantoj, kvaliton de produkto, korpan sanstaton).

tonsil/o. Ĉiu el pluraj limfaj organoj en la gorĝo ĉirkaŭ la faringo, kiuj protektas kontraŭ infektoj, precipe la du palataj tonsiloj ambaŭflanke de la gorĝo super la bazo de la lango: *palataj tonsiloj; faringa tonsilo; tuba tonsilo; langa tonsilo.*

tortur/i. Kruele turmentegi por eltiri konfeson (aŭ alian informon) aŭ por puni: *torturi kaptiton; torturi krimulon.*

transistor/o. Elektronika duonkondukta elemento uzata kiel signalfortigilo (analoge) aŭ kiel ŝaltilo (ciferece), ordinare kun tri kondukiloj (la kurento ĉe unu el la kondukiloj regas la kurenton tra la du aliaj).

tret/i. Piedpremi. Premi (forte) per la piedoj: *treti iun/ion (per la piedoj); treti sur iun/ion; treti (vinberojn) en vinpremejo.*

trib/o 1 Etna homgrupo (precipe se nomada aŭ rigardata kiel primitiva) vivanta en komunumo. **2** Subdivido de zoologia aŭ botanika familio (uzata por grupigi genrojn de grandaj familioj).

tukan/o. Birdo el tropika Ameriko, kun brilkoloraj plumoj kaj grandega, sed malpeza forta beko. (Rhamphastidae.)

tumor/o. Ŝvelaĵo aŭ kreskaĵo en la korpo pro malnormala multobliĝo de ĉeloj, kiu povas esti sendanĝera, se ĝi kreskas malrapide kaj ne disvastiĝas, sed en aliaj okazoj povas esti danĝere rapidkreska kaj invadema.

uni/o 1 Unuiĝo de landoj, kiuj konsentas pri komunigo de la tuto aŭ parto de sia regpovo. Tia unuiĝo povas esti interŝtata (ekz. Eŭropa Unio en 1992) aŭ unuŝtata (ekz. Sud-Afriko en 1910). **2** Asocio.

Kultura, sindikata aŭ partipolitika organizaĵo, forme analoga al unio *1*, konsistanta el regionaj societoj.

Uson/o. Lando en Nord-Ameriko, inter Atlantiko kaj Pacifiko, inter Kanado kaj Meksiko. Internacia landokodaĵo: US.

vagin/o. Interna kanalo ĉe virinoj kaj iuj bestinoj, kiun la peniseno penetras dum seksumado; ĉe virinoj ĝi kondukas de la vulvo ĝis la utero.

vaku/o 1 Kompleta foresto de materio. **2** Senaera malplena spaco.

valut/o 1 Mono aŭ monsigno (devizo, bankbiletoj, moneroj, akciaj kuponoj k.s.) cirkulanta en unu lando aŭ grupo da landoj. **2** Fremda devizo (ĉeko aŭ kambio). **3** Valoro de papermono rilate al la ora aŭ arĝenta metalunuo en valormetalbaza monsisistemo.

vand/o. Interna, maldika muro aŭ alispeca apartigaĵo dividanta iun spacon: *vando de ĉelo; vando de ĉambro; vando de vagono.*

versi/o 1 Prezento de afero el iu vidpunkto (normale kontraste al alia vidpunkto): *ŝi rakontis sian version de la aventuro.* **2** Formo, redakto aŭ eldono de teksto, programo k.s. (normale kontraste al alia formo/redakto/ eldono): *mi konas nur la germanan version de la poemo, kaj ne la originan polan version; Petro uzas la novan version de la programo.*

virtual/a. Kvazaŭa. Tia, ke ĝi funkcias, efikas aŭ impresas samkiel io, sed efektive estas io alia (plej ofte ne fizike reala): *virtuala memoro; virtuala rapido; virtuala realo.* (Tiu vorto, kiun *virtuala* gramatike priskribas, ekz. *memoro*, indikas tion, al kio la virtualaĵo similas.)

virus/o. Speco de infekta parazito, kiu estas pli simpla ol bakterio, kaj kiu povas reprodukti sin nur ene de kaj helpe de la ĉeloj de plurĉelaj organismoj.


vitamin/o. Organika nutrosubstanco, kiu en tre malgranda kvanto estas necesa por la kreskado kaj sano de homoj kaj bestoj: *manko de vitaminoj estigas malsanojn; oranĝoj enhavas vitaminon C; olesolveblaj vitaminoj (A, D, E, K); akvosolveblaj vitaminoj (B, PP, C, P).*

vodk/o. Brando el greno, terpomoj aŭ aliaj kreskaĵoj, senkolora kaj per si mem praktike sengusta, produktata precipe en Rusujo, Pollando kaj Svedujo.

vulv/o. La ekstera parto de la inaj seksorganoj ĉe la eniro de la vagino, konsistanta el la klitorio kaj la vaginaj lipoj.

zip/o. Fermilo, konsistanta el du rubandoj kun malgrandaj (metalaj aŭ plastaj) dentoj, kiuj interplektiĝas per ŝovado de movebla peco intera.

FINO



Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto / Red. Anna Löwenstein. — Milano: Federazione Esperantista Italiana, 2007. — 95 pĝ.

LA TEMO KAJ ENHAVO DE LA ARTIKOLARO

Pliparto de la artikoloj prezentas apologion de la uj-landonomoj kaj kritikon de la maniero uzi la fakte norman sed formale neoficialan sufikson *-i* por fari landonomojn. Krome, kelkaj pecoj humuraj traktas la du manierojn egale aŭ eĉ kun kelka simpatio por *-i*. En ĉi tiu recenzo temos nur pri la artikoloj nehumuraj; por indiki aŭtorojn ĉi-sube menciatajn plurfoje mi uzos la inicialojn:

AL Anna Löwenstein
BW Bertilo Wennergren
EdK Edwin de Kock
MB Montagu Butler
RF Rudolf Fischer

La situacio de recenzanto estas iom tikla: unuflanke, estas io nenobla kritiki opiniojn de marĝena malplimulto lojalisma; tamen aliflanke, ĝuste tia heroa provo kolekti la argumentojn por defendi la arkaikan uzon estas oportuna okazo por aprezi ĝian argumentadon laŭ ties vera valoro.

La artikolaro prezentas plurajn tezojn:

1. La sufikso *-uj* estas fundamenta (nekontesteble).

2. La vortero *-i* ne povas esti sufikso de Esperanto (kun tre stranga argumentado).

3. Estas problemo konstrui vorton por landano surbaze de landonomo, kaj la sufikso *-i* malfaciligas tion.

Krom unu aŭtoro neniu mencias la simplan solvon: alĝui la sufikson *-an* al ĉia ajn landonomo. La aŭtoroj implicite tabuas la kombinon *-ujano* (kiel en

En Rusio loĝas rusianoj

Recenza eseo de Sergio Pokrovskij

rusujano), mallogike kaj kontraŭfundamente opiniante ke *Xujano* = *Xo*.

La titolo de la artikolaro evidente estas citaĵo el la Fundamenta ekzercaro: “*La rusoj loĝas en Rusujo*”. Ĉu la manko de la artikolo spegulas la fakton ke hodiaŭ pli ol 20 milionoj da rusoj loĝas ekster Rusujo? (Tiam oni tamen probable konsciis, ke kontraŭe al la ĉi-supra misformulo ne ĉiu ruso estas rusujano.)

LANDO, REGNO, ETNO, NACIO

La plej grava difekto de la libro estas manko de adekvata prezento de la kontestata vidpunkto. Mi eĉ havas la impreson, ke plimulto de la aŭtoroj mise ĝin komprenas. Nu, per ĉi tiu recenzo mi provu kompensi tiun mankon.

Diskutante la problemon, la aŭtoroj uzas du vortojn: **lando** kaj **landano**. Por taŭga analizo necesas klare apartigi la *nociojn* kiujn ĝi koncernas, kaj kiujn la aŭtoroj konfuzas uzante tiujn du plur-sencajn vortojn. Nociojn logike malsamajn kaj tre realajn.

Lando kaj regno

Lando estas teritorio iel aparta — geografie, politike, kulture aŭ strategie. Iuj landoj ŝuldas sian apartecon al sia loĝantaro; aliaj, al fizika geografio, kaj eventuale povas havi loĝantaron multetan aŭ nenian. Ekz-e Siberio, Kaŭkazio, Mezopotamio, Magrebo, Nordio; Kristanujo, Islamujo, Mirlando.

La artikolaro implicite identigas landojn kun regnoj, kvankam fine de la artikolaro aperas “Listo de landoj kaj landanoj” kun la nek politikaj nek etnaj *Siberio*, *siberiano* (p. 92).

Nemalofte regno estas nomata laŭ unu el la etnoj kiuj tie loĝas aŭ iam loĝis. Ne nepre temas pri la plej granda, reganta etno (“la ĉefgento de ...ujo” laŭ la difinformulo de la PIV-oj). Ekz-e povas temi pri tribo, kiun eksteruloj renkontis unue, kiel la *britojn* dum la romia konkero. Sed ankaŭ, kaj eĉ pli frue, oni nomis la landon *Albiono* (Blanklando) — pro la kretaj rokoj apud Dovero, kiujn venanta kontinentano rimarkas unue.

Nacio kaj etno

Zamenhofs uzis “nacio”n en la senco de la nuna “etno” (kiel en Latino, en la rusa kaj almenaŭ en la liatempa germana lingvoj). Tial en Biblio aperas *nacianoj* (= alietnanoj); Esperanto estas lingvo *internacia* (t.e. por interretna komunikado).

Tamen angle kaj france *nation* ofte estas uzata anstataŭ *regno*, kaj ankaŭ ĉi tiu stranga uzo lasis sian spuron en Esperanto: *Internacio*, *Ligo de nacioj*, *Unuiĝintaj nacioj* koncernas ne etnojn sed regnojn. Ne maleblus diri, ke tia “nacio” estas politika etno.

Ni vidas etnojn ŝtathavajn (francoj, poloj, germanoj); senŝtatajn (eŭskoj, kurdoj); plurŝtatajn (araboj). Etno ne nepre estas ligita al teritorio: la hunoj vagadis tra la tuta Granda Stepo eŭrazia, de Ĉinio ĝis Romio. Etno povas havi diasporon kies anoj loĝas en diversaj landoj.

Unu sama lando povas ŝanĝi sian “ĉefgenton”. La antikvan Egiption priloĝis aparta nacio *egiptoj*; la nunaj *egiptanoj* plejparte apartenas al tute alia etno, ili estas parto de la araba nacio. La arabaj regnoj tiurilate similas ne naciajn ŝtatojn, sed provincojn de granda Arabujo, de Irako ĝis Magrebo; tial (en ŝajna kontraŭdiro kun la tuj prezentota “mondoparta principo”) por ili konvenas la deloka nomado (Alĝerio, Jordanio, Saudio, Irako).

Civitanecon la okcidentanoj nomas *nationalty*. Tian konfuzon mi opinias evitinda en Esperanto.

La mondoparta principo

La tradicia sistemo de Esperanto estas bazita sur empiria observo (kiun la nuna Akademio kaj la artikolaro ignoras): en Eŭrazio la gravaj regnoj plejparte havas nomon derivitan de etno (kiel derivilon la Fundamento uzas *uj-*; do, “uj-nomon”); dum en “la Nova mondo” regno ofte havas nomon derivitan de loka geografiaĵo. (Tio ne estas hazarda; la novmondaj landoj plejparte estas ekskolonioj, kies antaŭkolonia ŝtateco ne ekzistis aŭ iĝis senspurre detruita.)

BW negas ĉian tian principon (p. 14):

Tiu divido laŭ du kategorioj esence estas arbitra. Aparteno al la *uj*-kategorio diras nenion ajn pri la koncerna lando kaj ties popolo (Hm ... laŭ mi, oni rajtas konkludi ke temas pri lando malnovmonda. Ĉu ekzistas moderna *uj*-noma lando novmonda? — S.P.) ... Multaj provis trovi aŭ elpensi ian sistemecon en la klasado, sed tio plejparte estis vana.

“Birmo”, kiun sampaĝe BW prezentas kiel modelan ekzemplon pri ne-*uja* landonomo, loklingve estas nomo de la plej granda etno de la koncerna regno. Se oni sekvus la mondopartan sistemon (birmo → Birmujo; aŭ eble, laŭ alia prononcmalmaniero, mjanmo → Mjanmujo), eblus konstati, ke “el ĉiuj birmujanoj nur 69% estas birmoj”.

Tre kuriozaj estas ĉi-rilate la nomoj de Francio, precipe la franclingvaj. Jam la romianoj nomis ĝin deetne: *gaŭlo* → Gaŭlio. Sed Romio falis, la landon konkeris frankoj, kaj la lando ricevis novan nomon (latine *Francia*), egale deetnan, el kiu deriviĝis landonomo:

Franc → *la France* → *Français*, kp Frank/o → Frank/uj/o → frank/uj/an/o

La landonomo *Français* (-ais, -aise) funkcias simile al nia -an; kp *New York* → *New Yorkais*, t.e. *Novjorko* → *novjorkano*) akiris la kromfunkcion de surogata etnonomo; tial *Grammaire française* normale estas “Gramatiko de la franca lingvo”; apenaŭ oni tiel nomus gramatikon de la lingvo bretona, kvankam ankaŭ ĉi tiu estas unu el la lingvoj de Francio, kaj sekve “*francia* lingvo”.

Nacioj novmondaj

Ofta demando (ankaŭ en la artikolaro ĝi aperas): Kiel usonanoj vivas sen tia distingo inter regnanto kaj etnanto?

“La usona nacio” jes estas reala fenomeno — tamen ja tute alispeca ol “la albana nacio”. La kerno de la usona nacio estas ĝiaj politikaj institucioj kaj idearo: la plej antikva konstitucio de la mondo, la liberalaj principoj, la usona revo. Tial la usona nacio efektive estas forte ligita al la usona ŝtato kaj eĉ pli speciale, al ĝia politika reĝimo. La lojaleco de enmigrinto al la nova patrujo estas lojaleco al la ŝtato kaj egalas la sopiratan ŝtatanekon.

La etnoj tamen plu ekzistas ankaŭ en Ameriko, eĉ se alimaniere. Ankaŭ usone oni distingas inter *WASP*, *Latinos*, *Polish-Americans*, *Irish-Americans* ktp. Aliflanke mi neniam aŭdis pri “etna usonano” aŭ “*ethnic Canadian*” en la senco

“persono apartenanta al la kanada ĉefgento”; fakte, “*ethnic Canadian*” signifus proksimume “kanadano apartenanta al etna malpliopo” (ekz-e ĉindevena) — do, “*ethnic Canadian*” funkcias preskaŭ kontraŭe ol “*ethnic Albanian*”. Ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la realo la nacioj kaj etnoj en la Nova mondo funkcias alie ol en la Malnova. (Dirante tion mi esprimas nek aprobon nek malaprobon, mi nur konstatas diferencon.)

Simile la *romianoj* estis multetna nacio kies kernon formis la romia civilizacio kaj ideologio; tiel ke la neniom latinaj bizancianoj plu sin nomis kaj konsciis romianoj.

La franca revolucio havis similan inspiron: ĉiuj francujanoj estu francoj. La fakto, ke *Français* konfuzas la konceptojn etnan kaj regnan, helpis la ŝtaton mueli la iamajn provincojn kaj etnoj en homogenan mason da departementoj kaj francoj, malgraŭ ke en tiu lando ne estiĝis institucioj kompareblaj en sia stabilo kaj respektado al la usonanoj (dum la ekzisto de Usono la francoj ŝanĝis 5 respublikojn kaj 5 monarkiojn). La kerno de la eŭropaj nacioj restis etnoj, kaj la konfuzo inter nacio kaj etno, “*Ein Reich, ein Volk*” (unu regno, unu popolo), kondukis al la hororoj de naziismo kaj nunaj etnaj purigoj. (Menciindas ke la britujanoj ne konfuzas la nacian koncepton *British* kun la etna *English*.)

LA SUFIKSO -UJ

Interesa hipotezo pri la deveno de *-uj* [MB, p. 45]: El la slava landonoma finaĵo *-ija* kun ŝanĝo de *i* je *u*; en la skribo serba (kiun tamen Zamenhofo probable ne konis) tio eĉ grafike estas simila: *Србуја* (Serbujo).

Pedagogia valoro de -uj

BW ial opinias, ke regula uzo de la landa *uj*-sufikso helpus eviti erarojn kiel tiu de la de li elpensita erarekzemplo (p. 15):

Mi babilis kun du francanoj, tri usonoj kaj unu aŭstralo.

Laŭ mi la problemoj de ĉi tiu ekzemplo koncernas ne la sufiksojn (*-uj* aŭ *-i*), sed nescion de la mondoparta principo, kiun BW ne mencias specife sed forĵetas kiel maleblan ĝenerale (vd ĉi-supre).

Supozeble la parolanto ja scias, ke la du unuaj personoj venis el eŭrazia regno nomata per la internacia radiko FRANC; la problemoj estas, ĉu la radiko baze indikas la regnon (kiel en ilia lingvo: *la France*), ĉu la landanon (*Français*). Laŭ la mondoparta principo, ĉe la

landoj de la antaŭkoloniisma epoko, alivorte tiuj de la “antikve civilizita mondo”, t.e. Egiptujo, Etiopujo kaj la landoj de Azio kaj Eŭropo, la radikoj prefere estas etnaj: franco → Francujo / Francio. Dum en la resto de la mondo peretna landonomado ne ekzistas; tial Usono → usonano, Aŭstralio → aŭstraliano. La afero do funkcias egale ĉe *-uj* kaj ĉe *-i*.

Rusujanoj

Pluraj aŭtoroj ĵuras sian fidelecon al la Fundamento, sed unu ĝian solvon ili ignoras:

Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj (Ekzercaro, §37).

MB ŝajnas supozi, ke tia formo rilatas nur al nerusaj rusujanoj: “Aligentano loĝanta en lando de klaso II estas *-ujano* aŭ *-landano*” (p. 34); stranga interpreto, malkonforma al la senco de la sufikso *-an*. (La fundamenta ekzemplo jes indikas nerusajn rusujanojn — ĉar por klarigi diferencon, ke *ne ĉiuj* rusujanoj estas rusoj, necesas indiki okazon kie la diferenco evidentiĝas.)

Tiu preteratento estas tiom pli mirinda, ke la ĉefproblemo de aŭtoroj estas unueca maniero nomi landanon surbaze de la landonomo; ekz-e AL p. 8/9; BW (p. 16–17) trovas malfacila nomi landanojn de *Usono*, *Vjetnamio*, *Ĉilio*, *Uzbekio*, *Namibio*, *Ganao*, *Etiopio* (ĉar la fina *i* povas esti radika, kiel en *Ĉilio*). Tamen tiu sama BW iam konstatis en PMEG: “se oni hezitas, oni povas ĉiam trankvile uzi kunmetaĵon kun la sufikso AN: Franciano, Ĉiniano, Italiano, Pollandano k.t.p.”.

Mi trovas ĉarma tiun “se oni hezitas”. Se oni celas landanecon, oni ja senhezite uzu *-an* (ankaŭ ĉe deetna landonomo: *rusujano*). Se oni intencas paroli pri etno, oni ja devas scii, ke la etno ekzistas kaj kio estas ĝia nomo. Oni ja konsciu, ke la du dirmanieroj esprimas malsamajn ideojn. En la suda Siberio (kie mi loĝas) estas multe da kazaĥoj kiuj estas rusianoj (i.a. la guberniestro de la najbara Kemerova gubernio); kaj en Kazaĥio 30% de kazaĥianoj estas rusoj, 54% estas kazaĥoj. “Kazaĥo”, “ruso”, “kazaĥiano” kaj “rusiano” estas 4 malsamaj nocioj; inter miaj konatoj estas ĉiuj 4 kombinoj (ruso, rusiano; ruso, kazaĥiano; kazaĥo, rusiano; kazaĥo, kazaĥiano).

Ĝuste ĉi tiun diferencon instruas la ekzercara frazo pri la Rusujanoj, kaj ĝuste ĉi tiun lecionon ne lernis pluraj aŭtoroj de la artikolaro kaj la Akademio de Esperanto, kiel atestas la 3^a el la

akademijaj Rekomendoj pri la landonomoj (1985):

3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landonomoj kaj la koncernaj landonomoj ĉiam estas principe la samaj, kia ajn estas la kategorio de la landonomoj. Ekz-e, *Angl-ujo* / *-io* — *Angl-oj* kaj en la alia kategorio *Nederland-o* — *Nederland-anoj*.

Verdire, tiu rekomendo estas verkita tiel malklare kaj malklere, ke la nunaj akademianoj disopinias pri ĝia senco.

Ĉu ĝi instruas, ke etnonomo (kiel *anglo*) indikas apartenon al lando? Tio estas malvera, la afganiaj kaj ĉiniaj uzbekoj ne estas uzbekianoj.

Ĉu inverse, ĝi kontraŭfundamente trudas etnecon laŭ landaneco — ke ekz-e londona skoto aŭ kimro estu anglo, kiel la nederlandaj frisoj estas (laŭ sia civitaneco) nederlandanoj? Sed neangla anglujano supernocie nomas sin ne “anglo”, sed “brito” (por la britianoj “brito” funkcias sammaniere kiel “rusiano”). Ŝajnas, ke la verkinto de ĉi tiu rekomendo mem ne bone sciis, kion li skribas.

BW rekomendas (p. 18):

Neniu lernanto bezonas heziti, kiel paroli pri la landanoj de lando, kies nomon li renkontas je la unua fojo. Tio sekvas aŭtomate el du facilaj reguloj:

- se la landonomo finiĝas per *-ujo*, forprenu *uj*
- se la landonomo ne finiĝas per *-ujo*, aldonu *an*

Do, en la pasinta jaro, kiam BW skribis tiujn rekomendojn, oni per la nomo *Serbujo* tuj povis facile kompreni, ke la enloĝantoj de tiu lando (interalie, ĉiuj kosovanoj, ĉar Kosovo estis internacie agnoskita parto de Serbujo) estas serboj.


Por mialanda esperantisto estas surpriza la surprizo de Petro Desmet (p. 57):

Dum vizitoj al iamaj komunismaj landoj mi konstatis ke la gejunuloj tie kutimas reguligi tie jam multon! Por ili mi ne estis Belgo, mi ne estis Flandro, sed mi estis Belgiano kaj Flandriano... Post komenca ŝoko mi rapide alkutimiĝis kaj trovis la solvon ne malbona.

Ĉi tie malmulte rolas komunismo kaj la juneco, gravas la tradicio vivi en pluretna ŝtato, kie la diferenco inter ŝtataneco kaj etno estas klare distingata. Zamenhofo estis nek komunisto nek junulo kiam li verkis pri la *Rusujanoj*.

Jen kelkaj ekzemploj el la gazetaro:

Interalie, *litovianoj* rajtas senvize eniri en Kaliningradan regionon. [LOdE, 2002, №3, p. 17]



Tamen Trajkovski estas prezidento de ĉiuj *makedonianoj*, tiel de slavoj, kiel de etnaj minoritatoj – de albanoj (23% de la dumiliona loĝantaro), de turkoj kaj ciganoj [E. Georgiev, Monato].

Katalunianoj (kaj *hispanianoj*) kredas, ke la lando estas ĉefe katalunlingva, sed tio malfortigas laŭ la sociolinguistikaj esploroj [H. Alos i Font, Monato]

Tamen F. Toubale demandas (p. 65): “Kaj cetere, ĉu ne estas pli simple tuj scii, ke se la lando nomiĝas *Rusujo*, la civitano havos la nomon *ruso*?”

Simple, sed erare. Ne ĉiu rusiano estas ruso, samkiel ne ĉiu urbo alĝeria estas Alĝero: estas ankoraŭ Orano, Konstantino ktp. “Alĝeria esperantisto” ne nepre estas “alĝera esperantisto”, samkiel “franca esperantisto” ne nepre estas “pariza esperantisto”. Kiam Rusuja prezidento televide alparolas la civitanojn, li diras “Karaj rusianoj!”. Tio koncernas ĉiujn landanojn, ne nur la rusojn, sed ankaŭ tatarojn, jakutojn, kalmukojn, ĉeĉenojn... Ili havas sian propran nacian memon, kaj estas malĝentile, eĉ insulte, misnomi ilin “rusoj” — samkiel estus malĝentila nomi iun ajn per nomo de ties najbaro aŭ eĉ amiko.

-uj kaj la lingvo

Iam oni celas ne landanecon, sed la etnon — ekz-e kiam temas pri la lingvo uzenda por interparoli kun la koncerna landano.

Malgraŭ kelkaj esceptoj, plej ofte etnon karakterizas ĝia lingvo. Kaj forpreninte la sufikson *-uj*, ni kutime ricevas la nomon de etna lingvo: *Rusujo* — *la rusa*, *Francujo* — *la franca*, *Ĉinujo* — *la ĉina*. Sed pro la stranga opinio, ke

ĉiuj ĉinujanoj estas ĉinoj (kiel ĉe AL, p. 4) la PIV-oj opinias necesa paroli pri *Hanoj* kaj pri *la Hana lingvo*.

Menciindas, ke ĉe *Egiptujo* — *la egipta*, *Britujo* — *la brita* ni ankaŭ ricevas nomojn de lingvoj, tamen de lingvoj ne modernaj (kiaj estus la araba kaj la angla), sed tiuj de la antikvaj praloĝantoj. Tial la modernajn enloĝantojn pli konvenus nomi *egiptianoj* aŭ *egiptujanoj* kaj *britianoj* aŭ *britujanoj* (pri tiuj lastaj ĝuste tiel faras la lingvo rusa: *бритты* estas la keltaj praloĝantoj, *британцы* estas la modernaj britianoj; same pri la nomdonaj *бельџу/belgoj*, *прусы/prusoj* kontraste al la postaj *бельгийцы/belgianoj*, *пруссак/prusianoj*).

-LAND

Fakte *-land* funkcias simile al *-i*, ĝi egale aplikiĝas kaj al radikoj etnaj (Pollando) kaj alisencaj (Togolando). Tial malpravas BW prezentante *-land* kiel sinonimon de *-uj* (p. 14).

La radikparta *-lando* (Irlando, Nederlando) estas abunde menciata en la artikolaro. Plurfoje menciata la retroderivaĵo “*nederoj*” (ĉiam malaprobe). La eblon reguligi Irlandon (naciolingve *Éire*) per *ejro* → *Ejrujo*, *Ejrio* mencias neniu.

Ĉar la aŭtoroj konfuzas etnon kun ŝtataneco, neniu rimarkas la difekton de tiuj formoj: mankas la nomoj por la koncernaj “ĉefgentoj”. Frisoj, kiuj estas *nederlandanoj* (*nederianoj*) laŭ sia ŝtataneco, ja ne estas *nederlandanoj* (*nederoj*) laŭ sia etno.

LA SUFIKSO -I **Miskompreno pri la senco**

Pluraj aŭtoroj vidas en la landonoma *-i* nur alternativan formon de *-uj* — kvankam jam dekomence ĝi aperis kiel ties ĝeneraligo (ekz-e en la “Lingvaj respondoj” de Zamenhofo). Kaj kiel ekzemplojn pri nedezirinda misevoluo ili indikas *i*-derivaĵojn de negentaj radikoj — dum temas pri la uzo jam dekomence celita, eĉ por la sama *Alĝerio*, kies derivecon rifuzas agnoski RF (p. 61); simile EdK (p. 29) pri *Alĝerio*, *Liberio*, *Niĝerio*, *Tunizio*. Retroderivaĵon *Aŭstrio* → *aŭstro* EdK ŝajne opinias ridindaĵo — tamen ĝi ja estas reale kaj ofte uzata, pli ofte ol *aŭstrianoj* (kaj ĝin rekomendas BW en sia listo sur p. 92).

La landonoma *-i* funkcias iom simile al *-ul*: ĝi faras nomon el ajna karakteriza trajto, ne nepre la plej grava, sed laŭeble rekoniga. La ruĝa kufo ne estis la plej grava vestopeco de *Ruĝkufulineto* — sed ja sufiĉa por rekono.

Danke al sia ĝeneraleco, la landonoma *-i* estas do politike pli neŭtrala, ĝi prezentas la nomdonan etnon ne kiel “ĉefgenton” al kiu iel speciale “apartenas” la koncerna lando; sed kiel rekonilon, samkiel la altega monto Kameruno estas oportuna rekonilo por la lando Kameruno.

“Naturalismo” de *-i*

«La ĉefa motivo por enkonduki *-io* kiel sufikson landnoman estis la emo al “internacieco» [EdK, p. 26].

Ne vere. Kvankam internacieco per si mem estas bonvena, ne ĉiuj *-i*-sufiksaj landonomoj estas internaciaj. Unike esperantaj estas ekz-e *Balkanio, Britio, Ĉinio, Eburio, Koreio, Meksikio, Nordio, Romio, Sovetio, Ŝengeno, Vjetnamio*.

Respondante al la kritiko, ke *-uj* ne estas internacia, pluraj aŭtoroj de la artikolaro diras, ke tio ne gravas, ke apelacii al la internacieco de *-i* estas fia “naturalismo” (kaj mi konsentas: **ne tial** *-i* estas preferinda). Sed jen por kondamni la Zamenhofan landonomon *Meksikio* aperas tiu sama fia argumento: “Sed *Meksikio* ne estas internacia. Angle oni diras *Mexicans*, ne *Mexicians*” [MB 39; ankaŭ BW 21]. Simile en la plej fia spirito naturisma misrekondas la Akademio:

4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia “sufikso” aŭ sufikse uzata fremda vorto (*-io, -(i)stano*), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Mi trovas skandala ke la Akademio egaligas la malnovan kaj firme enradikiĝintan landonomon sufikson *-i* kun sia efemera *-istano*, kaj ke ĝi obstine rifuzas akcepti la vivan kaj produkteman esprimilon, submetante ĝian uzon al la ĥaoso de alilingva uzado.

Radikfina *-i*

Pluraj aŭtoroj vidas seriozan problemon en ŝajne sufiksa *-i* de Ĉilio [AL 4, 77; EdK 28, BW 17], Aŭstralio [EdK 29, AL 77, BW 17]. BW aldonas al tio “Namibio”n (p. 17), kvankam temas pri regula derivaĵo de la nomo de tiea dezerto (Namibo → Namibio).

Kurioze, ĉi tiujn aŭtorojn neniom ĝenas la de ili uzataj an-radikoj: afg/ano, alb/ano, germ/ano, hisp/ano, jap/ano, rum/ano... La an-problemo ja estas tute simetria kun la *-i*-problemo; tio, ke la unuan neniu el niaj aŭtoroj rimarkas aŭ mencias, konsiderinde malfortigas ilian argumenton.

Alisencaj *-i*-pseŭdosufiksoj

Por absurdigi la landofaran sufikson *-i* pluraj aŭtoroj (EdK 27/28, MB 42, RF 60) konfuzas ĝin kun la vortero *-i* heredita kun la internaciaĵoj; laŭ ili *Ital/i/o* kaj *biolog/i/o* entenas unu saman sufikson *-i*. Tian misprezenton ni trovas cetere en ambaŭ PIV-oj, kaj en la 2^a eĉ pli mise ol en la 1^a. Mi forte malkonsentas.

La situacio pri la diversaj *-i* similas la situacion pri la diversaj *-it*. En ĥemio *-it* indikas salon (sulfito) aŭ mineralon (magnetito). En medicino *-it* servas por nomi malsanon de organo indikita de la radikalo (bronkito, apendicito). Kaj tiujn du fakajn sencojn ambaŭ PIV-oj tute prave apartigas disde la esperanta sufikso partecipa.

Ĉar kvankam *apendicito, bronkito, hepatito* povas ŝajni derivaĵoj esperantaj, fakte ili estas formitaj ekster Esperanto: tion pruvas la radikoj kiuj malsamas ol la medicinaj. Oni ne diras *buŝito*, sed *stomatito*; la malsano de stomako estas ne *stomakito*, sed *gastrito* ktp. Simile *sulfito* ne estas derivaĵo esperanta (kia estus *sulfurito*).

La landonoma *-i* estas uzata libere por fari landonomojn sendepende je la internaciaj kutimoj, nur la Akademio kreis por si malracian tabuon (vd ĉi-supre). Sed la politikaj internaciaĵoj similaj al *tirano — tiranio, monarko — monarkio, demokrato — demokratio* ne estas libere konstrueblaj (PIV1 havas nur *tiranismon*, sen *tiranio*). Oni ne povas formi *prezidentio* aŭ *parlamentio* por la sencoj *prezidenta, parlamenta reĝimo*: kvankam tiaj nocioj ja ekzistas, oni ne formas ilian nomon per *-i*, ĉar oni ne faras tion internacie. Oni jes havas parojn kiel *biologo — biologio, pediatro — pediatrio*; sed maleblas konstrui *ĵurnalisto — ĵurnalistio* (celante la ĵurnalistan profesion), aŭ *monaĥo — monaĥio*.

Do, *biologo — biologio* estas komparebla al la duopa prunto *faŝisto — faŝismo*: ne temas pri derivado (ĉar radikoj FAŜ ne ekzistas en Esperanto). La provo malkomponi je *-olog/i/o* estas simila al provo malkomponi je *faŝis/t/o, faŝis/m/o*, deklarante ke *-t* kaj *-m* estas sufiksoj.

Ĉu *-i* estas sufikso

«... Oni ne povas diri *Svisio = io de Svisoj*. La vorto *io* kaj la finaĵo *i* jam havas alian signifon. Kiel sufikso “*i*” havas nenian sendependan signifon: ĝi estas escepto, kontraŭ la genio kaj la aglutina strukturo de la lingvo» [MB

42]. (Simile F. Simmonet p. 53, RF 59, ML 63. Ĉi tiujn argumentojn la legantoj de LODE povas trovi en la artikolo de M. Bavant, LODE, 2008, №3, p. 13–15.)

Nemalvere, tamen ankaŭ *ujo* neniel povas signifi *lando*, kaj egale maleblas diri *Svisujo = ujo de svisoj* (dum tute normala estas *inkujo = ujo por inko*).

La mencio de aglutineco ankaŭ estas dubinda: la uzbeka lingvo jes estas aglutina, tamen ĝiaj sufiksoj plejparte ne rolas kiel radikoj. En Esperanto mi ne rimarkis kutimon memstare uzi la participajn sufiksojn *ito* aŭ *oto*.

Malmulte gravas, ĉu oni nomu la landnomfarilon *-i* sufikso aŭ ne, gravas ke ĝi funkcias kaj estas parto de la reala Esperanto. Mi tamen rimarkigu, ke la normala lingvosciencia koncepto pri sufiksoj ne postulas ke ili povu funkcii radike — eĉ male. Se la konsiderataj argumentoj iel validas, tiam ili pruvas nur tion, ke ĝuste la fundamentaj “sufiksoj” *-uj, -ing, -ej* ktp ne estas sufiksoj (en la tradicia senco lingvosciencia), dum *-i* estas la plej vera sufikso! La koncernaj aŭtoroj renversas la terminaron kaj rifuzas nomi sufikson sufikso ĝuste ĉar ĝi estas striktasenca sufikso.

Mi ankoraŭ aldonu ke estas iluzio aserti, ke la sufiksado en Esperanto ĉiam funkcias idente al la radikokunmeto. “Patrino” ne estas “patro-ino”, la *sufikso* *-in* ne aldonas sencan al *patr-*, ĝi speguljetas ĝin en la komplementan sencokampon ingenran. Ordinara vortokunmeto “patroino” tion ne farus. Simile pri “Rusujo” (dum ekz-e “piedotingo” estus ja komprenebla samsence kiel “piedingo”, ĉi tie la kunmeta analizo funkcias).

PAG speciale traktas *-aĉ, -eg, -et* en aparta sekcio “Veraj sufiksoj”, ĉar ili funkcias alie ol la radikoj. La interesatoj legu en PAG.

La 15^a regulo

La nunaj rekomendoj de la Akademio entenas triopojn de la formo *franco, Francujo, Francio; ruso, Rusujo, Rusio* ktp. Se ilian *-i* oni agnoskas sufikso, tiam la triopoj estas samradikaj, proksimume kiel *pomo, pomujo, pomarbo*; sed se la sufiksecon de *-i* oni malakceptas, tiam necesas vidi en tiuj triopoj *parojn* da radikoj: FRANC kaj FRANCI, RUS kaj RUSI. Ĝi estas ekzakte tio, kion malrekondas la 15^a Regulo: “Ĉe diversaj vortoj de unu radikoj estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton bazan kaj formi la ceterajn derivaĵojn el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo internacia”.



Ĉu la kvin tezoj de “Esenco kaj estonteco...” plu aktualas?

de Horst Vogt

Enkonduko

Ludoviko Zamenhof komence de 1900 [Gueguen, Antaŭparolo] sub la pseŭdonimo S-ro Unuel verkis la artikolon *Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia* [Unuel, 336–365].

Tiun ĉi artikolon en la jaro 1900 laŭtlegis Louis de Beaufront antaŭ la kunvenintoj de la kongreso de *L’association Française pour l’avancement des Sciences* (Franca asocio por la progresigo de la sciencoj) en iom ŝanĝita kaj mallongigita franca traduko, elesperantigita de Louis de Beaufront kaj de Henri Valienne. Tiu franca teksto legeblas ĉe <http://membres.lycos.fr/tsalomon/essence.html>

Ĝi eĉ publikiĝis francelingve ĉe *Hachette*: <http://pagesperso-orange.fr/infolangues/Zamenhof/index4.htm>.

La afero restas al mi iom mistera: kial Zamenhof uzis pseŭdonimon? Kaj ĉu de Beaufront parolis en la nomo de s-ro Unuel aŭ ĉu li kondukis kiel la aŭtoro de la teksto?

Fakte Zamenhof enmetis la artikolon en 1903 — sub sama pseŭdonimo! — en la *Fundamentan Krestomation*. Nur en 1907 Zamenhof nomis sin aŭtoro de la eseo [kp. Gueguen, Antaŭparolo]. Eble pseŭdonimon li elektis pro tio, por ke li povu pli bone elstarigi la kvalitojn de sia propra lingvo ol decus fari al la aŭtoro mem.

Aliflanke la nomo de iu s-ro Unuel certe ne estis konata en Francio tiutempe, sekve ties analizo eble malpli interesus la kongresanojn de *l’Association française*. Kaj laŭ la bildo, kiun mi havas pri de Beaufront, mi apenaŭ povas imagi, ke li modeste legis la verkon nome de iu nekonata aliulo. Ankaŭ la fakto, ke li prilaboris la manuskripton de Zamenhof, laŭ mi indikas, ke Louis de Beaufront prelegis propranome. Cetere interesus, kompari la manuskripton de Zamenhof kun la franca teksto de la prelego de Louis de Beaufront.

Sed mi revenu al la demando, ĉu ankoraŭ hodiaŭ la tezoj aktualas.

Antaŭrimarko

Antaŭ ol elmeti la tezojn, Zamenhof sur pluraj paĝoj priplendas la manieron, en kiu la publiko ofte reagis al novaj ideoj nekutimaj kaj eksterordinaraj. Li multvorte pentras la sintenon de mem nomumitaj ekspertoj, kiuj post nur supra rigardo de la afero donas malfavoran juĝon kaj eksponas la iniciatinton al la moko de la publiko. Kaj la granda amaso de la senkritika publiko pro spirita inercio blinde sekvas la maljustan kaj malĝustan antaŭjuĝon. Nur post kiam la ideo montriĝis taŭga kaj bezona, ĉiuj miras, kial la antaŭa generacio kondukis tiom stulte. Por kapti la bonvolon de la aŭskultantaro, li emfazas, ke li per la prelego sin adresas al la homoj, kiuj povas memstare juĝi laŭ “nuda logiko.”

1a tezo: Lingvo internacia estas bezona

Zamenhof pritraktas la tezon, kvankam li opinias, ke jam la “plimulto de la inteligenta mondo” [Unuel, 340] konsentis al la neceso de tia lingvo. La ankoraŭ ne konvinkitaj samtempuloj laŭ li neas la bezonon nur pro tio, ke lingvo internacia kunportus la danĝeron de subpremo de la naciaj lingvoj. Hodiaŭ ne facile kompreneblas, ke Zamenhof “neniel povas kompreni, en kio konsistis la malfeliĉo de la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ... ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun nur unu ĉiuhoma lingvo” [Unuel, 340]. Ĉu li ne vidis, ke per formorto de ĉiu unuopa lingvo pereas propra kulturo kaj aparta priskribo de la mondo? Ke ĝi signifas perdon de almenaŭ parto de la persona identeco de la koncernaj homoj? Li eĉ nomas la timon antaŭ tia danĝero “ridinda”(!) kaj elkovaĵo ĉefe nur de la naciaj ŝovinistoj [Unuel, samloke]. Verŝajne li tiam ne konsciis, kion ni hodiaŭ dolore spertas,

nome kiom da t.n. malgrandaj lingvoj estas minacataj, pro la disvastigo de naciaj lingvoj. Kaj li sole havas en la menso neŭtralan internacian lingvon, al kiu li ne atribuas la econ, povi pereigi aliajn lingvojn. Zamenhof ankaŭ rapidas konstati, ke tasko de internacia lingvo ne estas substitui la naciajn.

Tute prave Zamenhof konkludas, ke enkonduko de (neŭtrala) internacia lingvo alportus al la homaro “bonfaran revolucion”, kompareblan nur malmulte kun aliaj inventaĵoj. La pravon de lia tezo ja montras la hodiaŭa pozicio de la angla. Ĝi ĉiam pli uzatas kiel internacia lingvo kaj ebligas kaj faciligas la interkompreniĝon en politiko, komerco, arto, sciencoj, sporto kaj turismo. Alia demando estas, ĉu la angla estas la plej bona kaj justa solvo.

2a tezo: internacia lingvo estas ebla

Zamenhof tiun ĉi punkton tuŝas relative mallonge. Li prave kontraŭas al la imago, ke la homoj de malsamaj rasoj havus malsamajn parolorganojn kaj sekve unusola lingvo ne povus esti prononcata ĉie en la mondo.

Sed li eble ne estis konscia pri tio, aŭ almenaŭ li tion ne pritraktas, ke ekz. anoj de aziaj lingvoj ne kapablas prononci (kaj eĉ ne povas aŭde distingi) kelkajn sonojn kaj son-sinsekvojn. Schleyer ekz. forĵetis la segmenton “r” el sia Volapuko, por faciligi la prononcadon por azianoj. Same amasigo de konsonantoj kiel en “majstro”, “onklo”, “lingvo” aŭ “improvizi” kaŭzas malfacilaĵojn, kiujn internacia lingvo laŭeble evitu. Ankaŭ la opozicioj inter p/b, f/v, t/d, s/z, k/g por multaj estas nur pene distingeblaj [Wells, 25].

Aliflanke, se planlingvo intencas uzi jam internacie konatajn vortojn, tiam tiaj problemoj estas immanentaj. Tamen Zamenhof, ĉu intence ĉu intuicie, enkondukis en Esperanton ne tro da fonemoj. Tiu fakto ebligas sufiĉe

grandan liberecon ĉe la prononcado, ĉar devojigo de la preciza prononcado ne gravas, ĉar ĝi ne kaŭzas signifoŝanĝon [Wells, 20].

Entute Zamenhof ja pravas — internacia lingvo estas ebla, t. e. ĉie aplik-ebla en la mondo, kion pruvas ne laste la relativa sukceso de Esperanto.

3a tezo: Internacia lingvo iam estos enkondukita

El tio, ke oni devas jesi la grandan utilon, kiun alportus internacia lingvo al la homaro kaj pro tio, ke tia lingvo estas ja entute ebla, Zamenhof konkludas, ke ĝi nepre iam estos enkondukita. Ĉar alie la homaro ne posedus “la plej elementan inteligentecon” [Unuel, 343]. Kompren-eble Zamenhof argumentante nur pen-sas pri la enkonduko de ellaborita, neŭtrala lingvo. La — teoria — deman-do por li nur povas esti, kiu (artefarita) lingvo montriĝos la plej taŭga.

Tiu konkludo estas por li tiom dev-iga, ke — se (neŭtrala) lingvo ne estos alprenita “de malsupre” per la homoj mem — li antaŭvidas, ke “la registaroj de ĉiuj landoj *devos* cedi, aranĝi interna-cian kongreson kaj elekti iun lingvon kiel internacian” [Unuel, 344; kursivigo en la originalo].

Ni hodiaŭ scias, ke Zamenhof tro fidis en tio, ke la homoj faras siajn deci-dojn ĉiam nur laŭ la pura racio. Ĉu li estis naiva tiurilate? Aŭ ĉu al li — aŭtoro de matura neŭtrala lingvo inter-nacia — mankis objektiva vido?


Ja intertempe enkondukiĝis lingvo internacie aplikata — la angla. Ĝi — post pena studado — ankaŭ alportas uti-lon al la (elitaj) uzantoj, la plej grandan tamen al la nacio(j), kies lingvo estas uzata. Kaj la imago pri internacia kon-greso, kiu elektas la plej taŭgan — neŭtralan — lingvon kiel internacian, kaŭzas al ni hodiaŭuloj amaran rideton. Ne libera elekto, sed politika kaj ekono-mia forto unuflanke kaj la allogo de la vivmaniero en la ekonomie sukcesa socio aliflanke kaŭzas la ĉiam pli ĝene-ralan uzon de la uson-angla lingvo.

4a tezo: la internacia lingvo iam enkondukota nepre estos arta lingvo

Zamenhof denove tute logike deduk-tas sian rezulton, ke la iam enkondukota internacia lingvo nepre estu planlingvo.

Tute prave li listigas la eblajn elekt-eblecojn, kiujn havus la decidontaj regi-staraj reprezentantoj, nome:

- vivantan etnan lingvon,
- mortintan etnan lingvon,



— unu el la ekzistantaj planlingvoj aŭ

— nove kreandan lingvon.

Zamenhof helpe de ekzemploj relie-figas la multe pli grandan facilecon de arta lingvo kompare al etnaj lingvoj vivaj aŭ mortaj, ekz. pro la manko de pluraj gramatikaj genroj, la ununuraj konjugacio kaj deklinacio, kunmetado/derivado de vortoj ktp. Ĉar el tiuj faktoj rezultas multoble pli rapida lernado de planlingvo, li konvinkiĝis, ke nur arta lingvo povas esti elektota.

Se tamen kontraŭ ĉiu racio kaj pru-dento estus elektota etna lingvo, “tiam kontraŭ tio ĉi protestus la vivo mem, kaj ilia elekto restus nur malviva litero” [Unuel, 347]. Elekto de etna lingvo kaŭzus “ke aperos ne sole la reciproka envio de la popoloj, sed ankaŭ la tute natura timo de ĉiu nacio jam simple pro sia ekzistado: ĉar ... tiu popolo, kies lin-gvo estos elektita kiel internacia, baldaŭ ricevos tian grandegan superforton super ĉiuj aliaj popoloj, ke ĝi ilin simple disprenos kaj englutos” [Unuel, 354]. Sed tiukaze “... la decido de la kongre-so restos simple malviva litero kaj fakte neniam ricevos efektivigo” [Unuel, 354].

Apenaŭ kredeblas, ke Zamenhof opiniis tiun ĉi dedukton kiel devigan. Ĉu li vere kredis, ke la delegitoj decidus unuanime? Ke ili evitus elekti etnan lin-gvon por eviti la danĝeron de kreskanta superforto? Ĉu li vere estis konvinkita, ke ĉiuj registaroj respektus la decidon, ankaŭ se ĝi ne respektus iliajn interesojn kaj preferojn? Li eble havis tro ideal-isman imagon pri la kunvivo en demok-ratio kaj la rilatoj inter ŝtatoj, eĉ se demokratraj.

“Sukceso plena en la Kongreso de la Societo Franca por la progresigo de l’ scien-coj, kies impresa komitato decidis poste la publikigon en ĝia pleneco de l’ tre longa raporto, kiun ni legis en la Kongreso, sub la titolo: *Esenco kaj estonteco de l’ ideo de lingvo internacia*, — notis de Beaufont en la jara revuo pri la agado de Société pour la propagation de l’Espéranto, publikigita en la januara kajero de *L’Espérantiste* (1901).

La “tre longa raporto” de Louis de Beau-front efektive aperis en 1901 en la aktoj de la kongreso *Extrait des comptes rendus de l’Association Française pour l’Avance-ment des Sciences: Congrès de Paris, 1900* (pĝ. 1057–1079).

Indas science kompari ĝin kun la kresto-matia teksto de Zamenhof kaj kun la franca eldono de *Hachette* (1907), kiu estas sur la apuda bildo.

En decembro 1920, kiam Ligo de Nacioj traktis la de Edmond Privat lanĉitan rezolucion favore al Esperanto, montriĝis ke ne racio kaj logiko, sed naciaj interesoj kaj politika premo diktis la decidon. Kaj tiam la rezolucio ja ne proponis la elekton de Esperanto kiel komuna lingvo. La diskutoj koncernis nur la modestan demandon, ĉu la Asembleo esprimu la esperon, ke la instruado de Esperanto fariĝu pli ĝenerala en la tuta mondo [Korĵenkov, 63]. La mocio fiaskis.

Kaj la pura logiko ankaŭ ĝis hodiaŭ ne progresis sur sia vojo al plena posedo de la homa decidkapablo: Eŭropa Unio intertempe nombras 27 membrojn kaj 23 oficialajn lingvojn. Senhelpe la unio drivas sen rimedo por trovi eliron el la lingva problemo. Ja, oni aŭ ne vidas la problemon klare aŭ eĉ tabuigas ĝin. Ĉar neniel la 27 membroj trovus politikan interkonsenton por decidi pri enkon-duko de iu — eĉ ne nacia — lingvo. Paradoxse: pro tiu paralizo ĉiam pli fortiĝas kaŝirante la pozicio de la angla kiel senkonkurenca “laborlingvo” — sen demokrata decido.

Kiom for la Zamenhofa profetado estis de la realeco!

5a tezo: la elektota planlingvo povas esti nur Esperanto

Zamenhof analizas nun Volapukon, la antaŭe estiĝintan planlingvon, kiu kiel konate atingis respektindan sukceson kaj multajn adeptojn en nur mallonga tem-po. Li sincere laŭdas la meritojn de Schleyer kiel pioniro de la ideo de arta internacia lingvo kaj juĝas la solvon tute taŭga, kiun Schleyer trovis por la vola-puka gramatiko. Sed li prave kritikas la

kripligitan vortmaterialon granda obstaklo por la lernado kaj memorado de Volapuko. Li aldone povas indiki al tio, ke Volapukistoj ekkonis la avantaĝojn de Esperanto kontraŭ Volapuko kaj jam multnombre forkuris al Esperanto.

Tiam Esperanto jam montriĝis matutura koncepto, facile lernebla, fleksebla, belsona kaj tiam antaŭ ĉio uzata jam dum pli ol dek jaroj. Por Zamenhof sekvas el tiuj faktoj, ke estonte neniu aŭtoro plu entreprenus la temporaban, suferkaj oferplenan taskon, ellabori novan planlingvon. Li mem konfesis, ke li estus ne plu trovinta la energion por la finpretigo de Esperanto, se li 5–6 jarojn pli frue estus konatiĝinta kun Volapuko!

Denove Zamenhof eraris pri la homa naturo. Venis ankoraŭ la proponoj Ido, Latino sine flexione, Occidental, Novial, Interlingua ktp. ktp. Ankoraŭ hodiaŭ ĉiujare aŭtoroj proponas novajn projektojn. En unu punkto li tamen pravis: lia lingvo restis la sola inter la planitaj, kiu ankoraŭ ludas rimarkindan rolon. Estus interese ekscii la reagojn de la aŭskultantoj de la franca akademio. Same interesus aŭdi la voĉojn de la samtempuloj de Zamenhof. Bedaŭrinde mi ne kapablis trovi tiutempajn reagojn.

Kaj la hodiaŭaj komentarioj? Serĉante en interreto mi malmulton elfosis. Troviĝas la Esperanta kaj la franca tekstoj sen komentoj ĉe <http://pagesperso-orange.fr/infolangues/Zamenhof/index4.htm> fare de Gueguen. Li nomas ĝin “admirinda, grava kaj aktuala eseo, riĉe argumentita” [Gueguen, Antaŭparolo], sen konkrete komenti la unuopajn ĉapitrojn.

La solan kritikan pritrakton de la eseo el hodiaŭa vidpunkto mi trovis ĉe Mark Fettes [Jubilea rerigardo pĝ. 194–202]. Laŭ Fettes la demandon de lingvo internacia Zamenhof kalkulis parto de la teknikaj sciencoj pro argumentado laŭ “nuda logiko”. Fettes bedaŭras [Fettes, 201], ke Zamenhof ne vidis/ne povis vidi la socian kaj kulturalan aspektojn de internacia lingvo. Zamenhof preterrigardis, ke la fakto, ke ĉiu homo principe povus lerni la saman lingvon, ne nepre signifas, ke tia lingvo ankaŭ estas socie ebla [Fettes, 197].

Krome, ke la akcepto de lingvo internacia estas multe pli malfacila ol imagita en la komenco, ne pro teknikaj-strukturaj, sed pro sociaj kialoj.

Kiel konsekvencon el tiu ĉi manko Fettes vidas, ke Esperantistoj ĝis en la 60aj jaroj de la 20a jarcento prezentis sian lingvon ĉefe kiel teknikan ilon,

sendependan de la homoj kaj de la situacioj, en kiuj ĝi uziĝas, kaj ke aplikata socia lingvistiko ne trovas la necesan atenton [Fettes, 202].

Konkludoj:

Se mi hodiaŭ havus la taskon aktualigi la Zamenhofajn tezojn, mi tekstus:

— Internacia lingvo alportas grandan utilon al la homaro,

— ĝi estas uzata,

— la angla enkondukiĝis sen demokrata legitimiĝo kaj sen konsidero de la avantaĝoj de planita lingvo,

— estas duba, ĉu iam planlingvo estos elektata,

— ĉu Esperanto transvivis la 21an jarcenton kiel private uzata internacia lingvo estas necerta [Carlevaro, 893–912]; tezo tamen forte rebatita de Bociort [Bociort, 141–156].

La Zamenhofa argumentado estas logike tute prava. Sed homoj — politikistoj same kiel normaluloj — malofte agas tiom konsekvence laŭracie. Enmiksiĝas politiko kaj kune kun ĝi kunrolas ekonomia forto (se ne ankaŭ milita forto) kaj naciaj interesoj. Ni ne forgesu la enigmojn de la homa psiko, kiu estas ankaŭ grava — ofte eĉ ne konscia — faktoro en la decida proceso. La psikoterapiisto Claude Piron eĉ diagnozas neŭrozon en la rilato de la publiko al planita lingvo kaj fortan psikan reziston kontraŭ la ideo de tia lingvo [Piron, 17].

Tia sole logika argumentado hodiaŭ ne plu estus ebla, ankaŭ ne kiel eventuala prognozo por la “tempo post la angla”.

Mi koncedas, ke Zamenhof povis ankoraŭ ne havi ideon pri la rolo de la psiko en tiu ludo. Verkante siajn tezojn li ankaŭ ne povis antaŭsenti la politikan kaj ekonomian evoluon en la 20a jarcento kaj la sukceson de la angla post la dua mondmilito.

Sed ne vidi la influon de politikaj kaj ekonomiaj interesoj, kiuj ĉiam estas ne fidinde takseblaj faktoroj en decidprocesoj, oni almenaŭ hodiaŭ nomus naiva. Mi momenton dubis, ke Zamenhof ne vere vidis tion. Kaj mi havis la impreson, ke li ne volis verki sciencajn artikolojn, sed prelegon kun ĉefe propagandaj celoj. Tio klarigus ankaŭ, kial Zamenhof uzis pseŭdonimon.

Sed verŝajne ĝuste lia infane naiva kredo al la bono kaj sincereco de la homoj kaj en la logikeco de la homaj decidoj donis al li la forton por lia dumviva senlacigebla batalo por lia Internacia Lingvo.

Bibliografio

Bociort, Ignat Florian. *Bedaŭrinda Verko*: repliko al Tazio Carlevaro “Ĉu Esperanto postvivis la jaron 2045?” // *Scienca Revuo*, 2007, pĝ. 141–156.

Carlevaro, Tazio. *Ĉu Esperanto postvivis la jaron 2045?* // Künzli A. Universalaj Lingvoj en Svislando. La Chaux-de Fonds: SES, CDELI, 2006.

Fettes, Mark. “*Esenco kaj estonteco*” — jubilea rerigardo // *Studoj pri interlingvistiko*: Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Dobřichovice, KAVA-PECH, 2001.

Gueguen, Raymond. Antaŭparolo al *Esenco kaj estonteco...* Limoges, 2006 <http://pagesperso-orange.fr/infolangues/Zamenhof/ESENCO/antauparolo.htm>

Korĵenkov, Aleksander. *Historio de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj, 2005.

Unuel [ps. de Ludoviko Zamenhof]. *Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia* // Nova Esperanta Krestomatia. Roterdamo: UEA, 1991.

Wells, John. *Linguistische Aspekte der Plansprache Esperanto* / Trad. el Esperanto Günther Becker. Saarbrücken: Fondaĵo Günther Becker, 1987.

Pri la aŭtoro

Horst Vogt naskiĝis en 1942 en Kassel (okcidenta Germanio), studis juron en la universitatoj de Hamburg kaj Marburg; sekvis 3,5-jara ŝtatservo kiel jura referendario kaj 30-jara laboro kiel sekciestro/prokuristo en konstrufinanca banko ĝis la emeritiĝo en 2000.

Esperantisto ekde 1963, Vogt kunlaboris per fakaj studoj, raportoj kaj tradukoj en *Pola Esperantisto*, *Scienca Revuo*, *Esperanto aktuell*, *La Gazeto*, *Literatura Foiro* ... Dum kvin jaroj oficis kiel trezoristo de FAME-fondaĵo.

Ĉi tiun eseon Horst Vogt verkis kadre de la kurso *Historio de Esperanto* en la 4a semestro de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando).



PV... PIV... NPIV...

Zamenhof asertis, ke Esperanto “devas kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estas ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj”. La evoluo de Esperanto precipe manifestiĝis en la plimultiĝo de la radikaro. En 1887 la unua vortareto konsistis el 927 elementoj (radikoj, afiksoj, finaĵoj, propraj nomoj) en la unua, rusa, eldono. La *Plena Vortaro Rusa-Internacia* (1889) de Zamenhof alportis konsiderindan riĉiĝon al la lingvo, sed nur parton de ĝia vorttrezoro oni trovas en la kvinlingva *Universala Vortaro* (1893), kiu enhavis 2644 erojn.

En la komenca etapo de la Esperanta leksikografio ĉiuj vortaroj estis redaktitaj de Zamenhof aŭ kontrolitaj de li. Sed Esperanto disvastiĝis kaj la Esperanta literaturo kreskis, kaj post la Idokrizo (1907–1908) aperis gravaj vortaroj de aliaj aŭtoroj. Inter ili la *Vortaro de Esperanto* de Kabe (1910), en kiu la vortoj estas klarigataj per aliaj vortoj en Esperanto.

Post la unua mondmilito, pro la socia kaj teknika evoluo esperantistoj bezonis pli modernan konsultilon. Tio instigis Eugēnon Lanti, la gvidanton de SAT, iniciati novan vortaron, kiu estu oportuna kaj praktika gvidilo. Li turnis sin al Emile Grosjean-Maupin, direktoro de la Akademia sekcio pri la Komuna Vortaro. Lanti precizigis: “Ni (t.e. la laboristaro grupita en SAT) bezonas gvidilon; ne gravas, ĉu tiu gvidilo estas ne tute perfekta, la ĉefa afero estas, ke ĝin oni sekvu kaj per ĝi unueciĝu la uzado”.

Tiu ambicio sekvigis la ĉefajn principojn de la *Plena Vortaro de Esperanto*: por helpi al korekta uzado de Esperanto, oni enkondukis klarigojn pri la sinonimoj kaj referencojn al signifoparencaj esprimoj; oni enmetis ekzemplojn, ĉar tio estas la plej taŭga rimedo komprenigi la sencojn kaj nuancojn de la vortoj aŭ esprimoj; sed, konsidere al la celata publiko, tiuj ekzemploj devis esti klaraj, mallongaj kaj aŭtoritataj: jen kial multaj ekzemploj, ĉerpitaj el la verkoj de Zamenhof aŭ de Kabe, estis modifitaj.

Post du jaroj da intensa laborado de Grosjean-Maupin kun aliaj kleruloj (Albert Esselin, Grenkamp-Kornfeld, Gaston Waringhien) la unua eldono aperis en 1930. Post ĝia rapida elĉerpiĝo sekvis en 1934 la dua eldono, reviziita kaj kompletigita. La dua eldono entenis 7004 artikolojn — nur ĉirkaŭ 200 pli ol



Eble ĝi estas la plej konata (kaj la plej ŝatata) Esperanto-foto: Gaston Waringhien transdonas la manuskripton de PIV al presado.

la unua — sed la enhavo de multaj el ili konsiderinde kreskis.

Grosjean-Maupin skribis en sia antaŭparolo: “Servi ne nur al tiuj, kiuj deziras ĝuste kompreni ĉiujn esprimojn kaj nuancojn de Esperanta teksto, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volas korekte kaj bonstile verki ion en Esperanto”. Estis preterlasitaj tiuj kunmetitaj vortoj, kies senso kaj kompreno prezentas nenion malfacilaĵon, kompanse multan atenton ricevis malfacilaj kaj hezigitaj punktoj.

Metaforaj sencoj servas al vivigo kaj riĉiĝo de la lingvo, tial zorga traktado ebligis, ke ili estu ĝenerale kaj internacie facile rekoneblaj. Propraj nomoj mankas en PV. La aŭtoroj decidis lasi flanke la problemon pri unuecigo de landnomaj formoj, ke la estonto solvu, se solvebla, tiun problemon. Ekster la pritrakto restis ankaŭ uzo aŭ neuzo de sufiksoj en kazoj, ĉe kiuj bonaj aŭtoroj uzas kaj aliaj same bonaj forlasas. Tiuj demandoj rilatas la stilon.

PV laŭ la origina intenco de Lanti estis destinita al laboristoj; sed temis pri tiuj laboristoj, kiuj havas politikan aŭ sindikatan engaĝitecon kaj, per la fakto mem, ke ili estas esperantistoj, zorgas pri internaciaj rilatoj, sekve pri laborista “elito”, kies bezonoj kaj postuloj estis sufiĉe proksimaj al multaj samepokaj burĝoj, kiuj interesiĝis pri la internaciaj aferoj. Danke al tio PV akiris multe pli vastan publikon, ol antaŭvidis la eldoninto (SAT). Cetere, bona debito de la PV (kaj solidaraĵoj donacoj) evitigis bankroton de SAT, kiam la gvidantaro

de SEU blokis grandan monsumon de SAT en Moskvo.

Lanti kovis pli aŭdacan projekton: li volis, ke PV fariĝu ilustrita enciklopedio, analoga al la franca *Petit Larousse Illustré*. Li instigis Waringhien-on entrepreni fundan revizion de PV, aldoni proprajn nomojn historiajn kaj geografiajn, starigi sciencan terminaron helpe de specialistoj.

Waringhien unue kompilis 64-paĝan *Suplementon*, aperintan en 1954 kun 966 artikoloj. PV estis regule reeldonata, ĝia 11a senŝanĝa eldono kun la *Suplemento* aperis en 1996.

Waringhien ne povis sola daŭrigi la ampleksan laboron, kaj al la laboro pri la *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) li invitis kunlaborantojn. La novan vortaron kun ĉ. 15250 artikoloj SAT eldonis en 1970.

En PIV la citado de ekzemploj estas pli ampleksa ol en PV, kaj ekzemploj estas pli sisteme elektitaj tiel, ke la frazoj estu utiligeblaj en konversacio. La ekzemploj estas prenitaj precipe el la (tradukitaj) verkoj de Zamenhof kaj de Kabe, kaj ankaŭ el la verkoj de pli modernaj aŭtoroj (Engholm, Rossetti, Schwartz k.a.). Tio ebligis trovi ĝustajn esprimojn por multaj ĉiutagaĵoj. Grava fonto de ekzemploj estas la Biblio, el kiu multaj esprimoj eniris en multajn lingvojn.


Malsama en PV kaj PIV estas la prezentomaniero de la kapvortoj. En PIV estas uzata la Fundamenta maniero kiam per streketoj (aŭ per superlinia ciferejo) la radiko estas disigata disde la finaĵo. Kiel asertas Waringhien “PIV kapablas rivali kun la plej konataj samdimensiaj vortaroj en la naciaj lingvoj kaj pri moderneco de la nomenklaturado kaj pri la ekzaktesco de la difinoj”.

La *Suplemento* al PIV aperis en 1987 sur 45 paĝoj. PIV havis kvar eldonojn.

En 1990 la Plenum-komitato de SAT petis al Michel Duc Goninaz entrepreni revizion de PIV.

En kolektiva laboro partoprenis c. 150 fakuloj, precipe por ĝustigi la terminojn en diversaj sciencoj kaj fakoj. La vortprovizo estis ĝisdatigita pere de la intertempe aperintaj tekstoj. Por speguli pli modernan uzadon de la lingvo, ekzemploj estis ĉerpitaj el diversaj verkoj, ankaŭ el gazetartikoloj. La *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* aperis ĉe SAT en 2002. Sekvis korektita eldono de 2005. Ĝi enhavas preskaŭ 17 mil kapvortojn (ĉ. 47 mil leksikajn unuojn) sur 1268 paĝoj.

Halina Gorecka



La sanktejo

de Paul Gubbins

Ĉiun li zorge eltondis. Konservis, kun suba, foje apuda, klarigo, en ĝia propra, plasta ujo. Kaj, dum siaj multaj, privataj momentoj, forŝlosita en sia studĉambro (sanktejo, kiel li ĝin nomis), for de familianoj — du kriĉantaj infanoj; tolerema, tro indulgema edzino; postulema avo, kiu rifuzis vegeti en sia ĉambro, kiel bonkonduta pensiulo atendanta sian finan rendevuon; kaj hundidon, la nerveze bojetantan, salivumantan monstreton, kiu jam tro familiare gratgratis kun katastrofaj konsekvencoj ĉe pantalonoj, pantofloj kaj la pacienco de ĉiuj hejmanoj — do for de ĝenoj kaj penoj, ĉu dupiedaj, ĉu kvarpiedaj, li turnis sin sekrete al siaj bildoj.

Ho, se tiuj, kun kiuj li almenaŭ teorie, ja fizike, dividis la domon, sciis; se ili eĉ suspektus, kion li faris, dum ili telespektis, provis vane lacigi kaj patron kaj hundidon; ho, se ili sciis. Sed ili ne sciis. Ne ĝenu vian patron, ili diris, se iu tro bruis, volis ion demandi. Via patro laboras. Verkas. Do ... ne ĝenu. Kaj, ĝenerale, ili ne ĝenis. Tiel estis pli facile.

La fotoj fascinis lin. Li ne povis sufiĉe rigardi, rerigardi. Li studis, analizis, sorbis ĉiun detalon. Kolorojn, konturojn; prezentajn, poziciojn: ĉiujn facetojn de la fotoj li sublupee ekzamenis, enmemorigis. La bildojn li komparis, celante percepti komunajn trajtojn; foje, post funda esplorado, li eĉ kredis, ke li staras sursojle de grava malkovro. Tiel, li diris al si, tiel mi povas lerni. Lerni, kio inspiras, animas; lerni, kio, karesante kaj kisante la spiriton, samtempe tiklas la talenton; lerni, simple, kio kreas kreivon.

Tial la bildoj. Felietonaj bildoj el dika, semajnfina gazeto, montrantaj la kabinetojn, aŭ atelierojn, de konataj verkistoj. Neniam videblas la aŭtoroj mem: nur la ĉambroj, kie ili — almenaŭ kelkaj — cerbumas, sed kie ili ĉiuj vortumas, frazumas; kie ili solvas siajn dilemojn pri intrigo aŭ karaktero; kie ili kreas siajn verkojn kaj — damne — sian sukceson: sukceson, renomon, kiuj lin — tute neklarigeble — preterpasadas, malgraŭ publikigaĵoj inkluzivantaj amuz-poemon en volumeto eldonita de karitata fonduso por ŝveligi la kason de loka malsanulejo, rakonton certe publikigotan en la urba ĵurnalo (laŭ pasintjara redaktora promeso) kaj — la majstraĵon — preskaŭ kompletan kvarmil-vortan enkondukan ĉapitron el planata, ja verkata romano pri povo kaj pasio dum la krucmilitoj. Ho, la romano ... nu, kiel li mem, modeste, diris, pri genio ne eblas paroli, sed pri talento, jes, talento abunda, tamen talento ankoraŭ ne rekonata.

Tial la graveco de la laborejoj de tiuj granduloj, kiuj grandanime interrompis sian labor-ritmon por permesi enrigardon, eĉ perforton, de ĉiam severa, ĉion vidanta fotila lenso. Jen kabinetoj de furor-romanistoj; porinfanaj verkistoj; poetoj; humoristoj; dramistoj; eseistoj; novelistoj; rakontistoj: nomoj, kies libroj troviĝas sur la bretoj de ĉiuj librovendejoj; nomoj, kies verkoj estas recenzitaj sur la paĝoj de mal multe legataj sed — kompanse — prestiĝaj gazetoj; homoj, kiuj sidas surpodie ĉe libro-festivaloj aŭ en la studioj de malfrunoktaj televidaj programoj elsendataj de etbuĝetaj

kanaloj; homoj, kiuj gajnas monpremiojn (sed ankoraŭ ne riĉiĝas) en internaciaj konkursoj kun neprononceblaj nomoj. Do neniel neniuaro, sed iuaro: iuaro, al kiu li sopiras aliĝi.

La fotoj aperis ĉiusabate, triapaĝe de la felietono, ĉiam supre, dekstre. Facile troveblaj, facile studeblaj, ĝis la ekstaza momento — ĝenerale la sekvan tagon — kiam eblas preni tondilon kaj alproprigi la bildon cele al funda analizo en lia sanktejo. Tio nepras: sanktejon analizi en sanktejo. Tiel, almenaŭ en lia menso, kunfandiĝus subjekto kaj objekto; tiel pli fekunde, pli efike, distileblus la esenco de la sanktejoj de la granduloj. Certe, li rezonis, la sanktejoj, kaj ĉio, kio enestas — la mebloj, la ornamaĵoj, la bildoj — nepre kontribuas al la sukceso de tiuj, kiuj tie verkas: se eblas krei etoson tian, do tiel, li sin persvadis, estus laŭrokronataj ankaŭ liaj klopodoj.

Ĉio, kio enestas. Ankaŭ ĉio, kio ne enestas. Tre frue, komparante dekon da bildoj kaj zorge legante la akompanajn tekstojn, li mirigite konstatis, kiom da aŭtoroj ne uzas komputilon. Almenaŭ ne komence: poste eble jes, kiam prespretos la manuskripto. La Nobel-premiito, ekzemple, verkis mane, uzante elegantan, kaj relative ekskluzivan fontoplumon; la gajninto de la Bilkstein-Vandenbreit-premio preferis skribomaŝinon: multaj aŭtoroj insistis, ke ne eblas komputil-klavare krei. Kaj prave: nur malofte en la sanktejoj videblis komputiloj, ekranoj, printiloj kaj aliaj elektronikaj nepraĵoj de la 21a jarcento. Telefonoj, jes: konata, komforta teknologio

de la 19a jarcento. Eĉ aŭtoroj, li diris al si, devas fojfoje komuniki kun la cetera mondo. Kun agentoj. Eldonistoj. Ankaŭ kun prifinancaj konsilistoj.

Lia edzino, kutimiĝinta al la kapricoj de sia edzo, ne multe surpriziĝis, kiam unu tagon li malsupreniris de sia sanktejo, portante la komputilon. Do, li diris. Vi havu. Mi estas elfosonta la skribomaŝinon. Nur kompromise, vi komprenas. Ĝis mi akiros fontoplumon — Rajt-fontoplumon, nur Rajt, kiel uzas samprofesiuloj. Iom multekostas, sciuj, sed eble kristnaskodonace vi povus ... Lia edzino, apenaŭ perceptebla, kuntiretante la brovojn, mienis nek jese, nek nee. Rajt, li ripetis. Nepre. Bonvole ... ne forgesu.

La skribomaŝino ne multe efikis. Male. Iritis la klaketado, misfunkciadis la e-klavo, ĝenis la korektoj. Kaj, kiam li eniris vendejon, por aĉeti novan inkubandon, oni informis: Jam de jaroj ne plu haveblas rubandoj tiaj. Se vere necese, eblas mem inki la rubandon. Tamen, sinjoro, tio ne konsilindas. Ĉu vi konsideris komputilon ...? Li eliris la vendejon, iom seniluziiginta, sed konsolis sin, ke la skribomaŝino nur provizoras: kiam li havos la fontoplumon, ĉio solviĝos. Fluos. Ideoj, vortoj. Kiel montara rivereto. Kio inspiris lin hajkumi. Belan hajkon li elpensis survoje hejmen sed, forgesinte enpoŝigi krajonon kaj notlibreton, li ne plu memoris ĝin, kiam li fine eksidis ĉe sia skribomaŝino.

Intertempe, daŭre kurbiĝante super siaj bildoj, kaj dume atendante la kristnaskan fontoplumon, li decidis, ke multo ankoraŭ fareblos. Ekzemple, la mebloj. Aparte la skribotablo. Li notis, ke la tablo de krimromanisto, kiun li aparte admiris, staris oblikve meze de la ĉambro. Li imagis la majstron rondiranta, daŭre rondiranta, solvanta krimojn, kiujn li mem elpensis, kaj foje haltanta por surpaperigi — ne videblis skribomaŝino aŭ komputilo — la elegantajn frazojn, kiuj lin markis kiel belan stiliston.

Dum tri tagoj li rearanĝis sian sanktejon, trenante sian viktorene

solidan skribotablon ĝis la mezon de la ĉambro, tiel sulketigante la plankon, ŝirante la tapiŝon kaj dolore streĉante ŝultran muskolon. Cetere necesis reloki du ŝrankojn, tri bildojn kaj almenaŭ duonon de la libroj, magazinoj, revuoj kaj aliaj ankoraŭ nelegitaj legaĵoj: ekzerco, kio necesis malmunti du murbretarojn kaj ilin alimuren remunti. Pro la bruo plendegis la infanoj, dirante, ke ili ne povas koncentriĝi pri siaj komputilaj ludoj. Pro la odoraĉo de la freŝe farbita muro, kie iam staris unu el la bretaroj, plendetis lia edzino, kiu suferis en junaĝo iomete pro astmo. La hundido viŝis sian voston kontraŭ farbon ankoraŭ ne sekiĝintan kaj poste, voston svingante, sursaltis la sofona en la salono. La avo — verŝajne akcidente — glutis tro da dormigaj piloloj (maleblis dormi, kiel li diris poste, pro la tohuvabohuo en la hejmo) kaj estis enambulancigita al krizhospitalo.

Bedaŭrinde en la mezo de la sanktejo, kie nun troviĝis la tablo, mankis sufiĉe da natura, elfenestra lumo. Spekti, certe inspekti, la bildojn, eĉ kun — eble pro — tablolampo, veigis al li la okulojn. Kelkajn tagojn poste, kiam la aliaj familianoj vizitis la avon en la hospitalo, li enplankigis novajn sulketojn, eĉ pli mal-

teksis la tapiŝon, kaj denove martirigis siajn muskolojn, puŝante la skribotablon ree apud la fenestron. Ĉu ne la sciencfikciisto, kies sanktejo aperis en la ĵusa felietono, ĵuris pri la bezono de panoramo super kampoj, horizontoj kaj aliaj mondoj? Panoramo, klare, iom malfacilis; tamen superrigardo trans najbara legomĝardeneto ĝis la enbrikitaj fenestroj de iama biciklo-fabriko ne povus malhelpi.

La fiaskiĝinta unua meblo-eksperimento ne malinstigis lin provi denove. Rimarkeblis, en pluraj sanktejoj, kanapoj: jen, verŝajne, la ŝlosilo al famo kaj fortuna. La kreintino de naŭze sukcesa serio de t.n. historiaj am-aventuroj — flughavena literaturo, kiel li priskribis ilin — diris, ke ŝi ripozas, verkonte, sur kanapo, por elvoki la ĝustan mensan staton. Mondesploristo, aŭtoro de dekoj da privojaĝaj volumoj, uzas sian kanapon kiel specon de librujo: la loko de la intrigo de la unua libro, kiu defalas, determinas sian venontan vojaĝon. Klare, por funde kompreni la fenomenon, neprus doktoriĝa disertacio pri La Ontologio kaj Epistemologio de la Kanapo en la Verka Procezo, kun Aparta Analizo de Meblara Metalepso. Aŭ eble pli simplus kanapon aĉeti.



Dirite, farite: iom vermborita specimeno, kiu, dum li manovris — helpate de lia edzino — por suprenigi ĝin laŭ la ŝtuparo ĝis la sanktejo, decidis, ke ĝi preferis la salonon, kaj provis retrogliti, dume skrapante la muron kaj, pli grave, tiel premegante la fingrojn de lia dekstra mano, ke verki, ĉu mane, ĉu maŝine, ne eblis dum tri tagoj.

Premegita estis ankaŭ la pacienco de lia kutime pli ol pacienca edzino. Tiu vermojo ... ŝi komencis. Kanapo, li korektis, sed vane. Tiu vermojo, ŝi daŭrigis, ne restos eĉ unu plian minuton sub mia tegmento. Suprenigi ĝin ne eblas. Sube ne estas spaco. Do revenigu ĝin al la rubujo, kie vi ĝin trovis.

Rubujo ... li elbuŝigis, kvazaŭ strangolate. Nenia rubujo. Mi bone elspezis ... kaj tuj bedaŭris, ke monon li menciis.

La okuloj de lia edzino fendigis. Kiom? ŝi pafis. Konfesu ... kiom?

Nur kvindek, li mensogis, veron trionigante. Kaj, pacige: Vi pravas. La kanapo foriros. Mi rehavigos al mi la monon. Fidu, li diris, mem nefidante.

Tiel finiĝis la kanapo-kaprico. Sed ankoraŭ mankis io: io, kio permesus al li spiri la saman aeron kiel la steluloj, kies sanktejojn, danke al kreskanta bildo-kolekto, li avide analizas; io, kio same pelus lin al la pinto de profesio, kiun li promesis al si. Tutcerte, la sekreto, la ŝlosilo, enestas en la bildoj. Verŝajne li jam x-fojojn rigardis ĝin: rigardis, sed ne vidis. Eble ... eble dependas sukceso ne de la grandaj, tuj rimarkeblaj, kaj iasence publikaj objektoj, kiaj tabloj aŭ kanapoj, sed de la malgrandaj, pli personaj aĵoj, kiuj, li nun konstatis, ornamas preskaŭ ĉiujn el la fotitaj atelieroj. Fakte, ju pli li ekzamenis, des pli li kredis, ke vortoj kiaj ateliero, kabineto, eĉ sanktejo, apenaŭ taŭgas. Plejparte la fotoj montris ne ĉambrojn sed ... kion? Nu, grotojn, kavojn, kavernojn, do privatajn trezorejojn plenigitajn de donacetoj, memorigaĵoj, suveniroj, verdire fatraso, pri kiu fierus ajna brokantejo aŭ bazaro. Sed ... kia fatraso! Signifa fatraso, fatraso kun historio,

pasinteco; fatraso, kiu flustras, kiu formas, kiu fekundigas. Fatraso, kiu famigos.

Tuj li eklistigis ĉiujn objektojn, ĉiujn ornamaĵojn sublupee videblajn en la grotoj de la granduloj. Dum tri tagoj kaj tri noktoj li skribis, notis, elirante la sanktejon nur por necesejumi, iom sin nutri. Li petis sian edzinon telefoni al la asekuro-oficejo, kie li senentuziasme etkontoristis, por diri, ke li febras (kio ne malveris); al ŝi li klarigis, ke la romano, lia tuta verkista kariero, nepre dependos de la venontaj tagoj; temas pri famo aŭ falo, ĉio aŭ nenio. Lia edzino, iom kontraŭvole telefoninte, decidis, ke temos pri nenio: dum li fermis sin en la sanktejo, ŝi malfermis valizojn, enĵetis vestaĵojn kaj — metafore — infanojn, kaj ekiris fratinen. Alveninte, ŝi subite memoris la avon, intertempe elhospitaligita kaj denove en la hejmo. Memoris, sed nur momente. Li prizorgu. Aŭ ne. Egale. Kaj pri la hundido ... nu, ĝi travivos.

La listo longegis. Tiom da aferoj por alproprigi, por alporti al la sanktejo. Ĉe la Nobel-premiito notebliis klaŭneto ranforma horloĝo plasta melopsitako 1930a radioaparato konkoj lambastono kun tenilo serpentforma kato verŝajne vivanta karbominista lampo korneto; ĉe la lasta gajninto de la premio Talento de la Jaro, stirilo flava tekruĉo pluŝurso pupdomo desegnaĵo pri la papo rajdanta kondomon ovujaro piedpilko kun aŭtografoj afrika masko alia masko; ĉe la honorofica t.n. nacia poeto, fusilo kugloj tranĉilo remburita papago; ĉe la aŭtorino de la furor-romano Baleno-baleto, enboteligitaj ŝipeto kandelingo ... kaj tiel precize pedante plu.

Kiam, kelkajn semajnojn poste, revenis lia edzino, laŭ insisto de la fratino, kiu ne plu toleris la senĉesajn memkulpigojn de virino, kiu laŭkonfese malice, mallojale forlasis sian edzon, ŝi apenaŭ rekonis sian hejmon. En ĉiu ĉambro amasiĝis, kiel ŝi diris, bagatelaĵoj; nur kun granda peno eblis navigi de unu ĉambro al alia; mankis lumo pro kestoj kaj skatoloj stapligitaj kontraŭ la fenestroj; ie, nevidebla, kaj

verŝajne enprizonigita pro tabloj kaj bretoj plendantaj sub la premo de fiŝujoj, vazoj, gramofonoj kaj cervokornoj, petegis avo, ke iu alportu tagmanĝon; la sola hundido-spuro estis jam sekiĝinta fekaĵo malantaŭ la ĉefpordo; dum salutis ŝin gaje la edzo, dirante: Vidu, kara, kiel ĉio fluas ... kiel realiĝas la revoj. Tiom da ideoj ... ĉu mi ne diris? Sed nepras flugi. Diskogurdo ... la Dubruit-premiito havas ĉe si ... do vendas iu apud la stacidomo. Imagu ... klasika! Ĝis!

Tiel komenciĝis lia nova kariero. Literatura antikvaĵisto, laŭ anoncoj en aŭtoraj fakrevuoj kaj semajnfinaj gazetoj: literatura antikvaĵisto, servante verkistojn ie ajn en la mondo, kiuj volas inspiriĝi, volas vekri kremenon, helpate de objekto, kies spirito inspiris grandulon, tiun pelante al riĉoj kaj renomo. Kaj venis mendoj, ĉefe el verkemuloj el katolikaj landoj, kie statuetoj kaj similaj ikonoj foje pli akcepteblas ol aliaj, pli solidaj konoj; sed la mendoj ne sufiĉis por konvinki la edzinon, ke indos resti. La avon ŝi enflejegigis kaj iun nokton, kun la infanoj, fuĝis: poste ŝi kunvivis tre feliĉe kun analfabeta taksiisto, unue certiginte, ke en la nova komuna hejmo estas eĉ ne unusola romano aŭ poemaro ... nur plej luksa, larĝekrana kaj multkanala televido.

Kaj li? Li daŭre eltondas el la felietono la fotojn pri aŭtoraj sanktejoj; daŭre aldonas al sia listo la nomojn de la tie troveblaj objektoj; daŭre elserĉas la koncernajn aĵojn kaj fiere revenigas ilin al sia antikvaĵejo. Kio, kiel li anticipis, ja inspiras, ja levas la spiriton, tiel ke li planas freŝan romanon pri ... nu ... la vivo de literaturista antikvaĵisto. Sed li ne povas decidi, ĉu verki komedie aŭ tragedie. Aŭ ĉu ambaŭ. Sed iam ...

Parenteze la hundido, nun tutcerte hundo, nebuliĝis. Kien, ne eblas diri. Sed el ĉiuj Nobel-kaj aliaj premiitoj, furor-romanistoj, poetoj, eseistoj kaj iamaj asekuro-etkontoristoj, ŝajnas, ke la hundo estas la plej saĝa.

Pro La sanktejo Paul Gubbins fariĝis laŭreato de Liro-2007.

Poemoj de Gavriil Derĵavin

Gavriil (Gavrila) Románoviĉ Derĵavin (1743–1816) estas la lasta 18-jarcenta poeto en nia antologio. Naskita en neriĉa nobela familio, li ricevis malbonan edukadon, soldatservis, kartludis kaj deliktis, sed post partopreno en sufokado de la ribelo de Pugaĉov (1773–1775) li rapide kariesis: guberniestro en Tambov, senatano, ŝtatestretario ĉe Katerina II, financministro de Paŭlo I, justicministro de Aleksandro I. Sed “arda kaj diable verama” li ne longe restis en ĉiu el siaj postenoj...

Por ni li estas poeto. Li malakceptis la poetikon de Sumarokov kaj konvertiĝis al Lomonosov, sed ties rekomendon uzi la “altan stilon” en odoj li baldaŭ forĵetis, ekuzinte en ili la ordinaran kaj eĉ la popolan stilojn (“aŭtun’ ... levinte jupon antaŭ ni, riverojn pluvus”). Lin famigis odo *Felica* (1782), dediĉita al Katerina II, kaj preskaŭ ĉiuj liaj grandaj verkoj estis ligitaj kun tiutempa vivo. Krom odoj (*Al regantoj kaj juĝistoj*, *Konkero de Izmail*, *Venkoj en Italio*, *Akvofalo* k.a.), tro longaj por nia rubriko, li verkis malpli longajn poemojn amajn, anakreoneskajn, satirajn. Kelkajn el ili legu ĉi tie.



Alko

PRI LAŬMODA SPRITO DE LA JARO 1780

*Pensadi pri nenio, dubon ĉiam spiti,
Al ĉio doni tuj decidon sen heziti,
Sen multe da kompren’, pri multo babiladi;
Arogi, sed scipovi per arogo flati;
Pliigi belan vanton, en palavro droni,
Al malamik’, amiko per rigard’ imponi
Per afableco brili, sed en ver’ — ignori,
Stultulojn priridante, ilin ja favori,
Kaj ami laŭ profit’, amiki laŭ selekto,
Kovardi en anim’, fieri per aspekto,
El fremda konto vivi kun impres’ nobela,
Stature gravi eĉ en kazo bagatela,
Por akra vort’ ŝercadi ankaŭ pri justico,
Gepatrojn kaj eĉ tronon moki kun malico,
Resume, per supraĵaj diroj interveni,
De ĉiuj studoj sole florojn ŝire preni,
Dishaki nodon, se malligi ĝin ne scias —
Jen kion ofte ni je sprito opinias!*

AL MI MEM

*Kial, kial mi tumultas,
Ŝarĝas min per ofcad’,
Se la mondo min insultas,
Ke plej rektas mia pad’?
Do laboru iu kroma,
Multas saĝa sinjorar’:
Estas propra bon’ pordoma
Kaj enspezo por la car’.
Se mi senutile aĉas
Pro fervoro kaj verem’ —
Al virinoj, muzoj plaĉas
De [Eroto] arda trem’.
Do kun li mi kamaradu,
Manĝu, dormu mi ĝis sat’;
Jes, prefere mi pigradu
Ol suferu pro malŝat’.
En afer’ ne estos brula,
Mi nur gastos ĉe la ver’,
Iĝos oficist’ skrupula,
Pli avidos je moner’.
Tiam ofte, dum matenos,
Ĉarma muzo logos min;
Poste mi en liton venos
Por brakumo de l’ edzin’.*

RIĈECO

*Se povus ni per riĉaĵaro
Mallongan vivon pli kaj pli
Daŭrigi sen eĉ ajna baro —
Do oron kolektadus mi.
Mi tenus oron akumulite:
Se morto venos preni min,
Mi svingus poŝon senskrupule
Por lui vivon el destin’.
Sed se ne povas la trezoro
Aĉeti vivon po moment’,
Do kial pro avid’ je oro
Kvieton nian rompas tent’?
Ĉu ne pli bone estas — vervi
Festene kun amika hom’;
Al junaj belulinoj servi
Sur molaj litoj, en arom’?*

MONUMENTO

*Mi kreis por etern’ mirindan monumenton,
Pli firman ol metaloj kaj antikva templ’;
Ĝi kontraŭstaros tondron kaj kruelan venton,
Kaj ne detruos ĝin flugado de la temp’.
Ne tuta mortos mi, sed parto mia grava
Evite putron, vivos post la morta hor’,
Kaj dum en univers’ prosperos gento slava,
Kreskados ne velkante mia digna glor’.
Disiros fam’ de l’ Blanka ĝis la Nigra maro,
Super rivera flu’ kaj kampa infinit’;
Memoros ĉiu inter multa la homaro,
Kiel ricevis mi aprezon pro l’ merit’,
Ke plej unua mi per rusa vort’ petoli
Aŭdacis, aklamante virtojn de l’ reĝin’,
La Dion kun tutkora simpla preparoli,
Al caroj diri veron sen humila klin’.
Ho Muzo, ekfieri juste laŭ merito,
Se iu spitos vin — respondu per ignor’;
Kaj propramane, trankvilema sen ekscito
Min kronu per aŭroro de senmorta glor’.*
Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**



Litova bibliografio

Bibliografio de litovaj Esperanto-eldonaĵoj (1890–2006) / Kompilis Petras Čeliauskas. — Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2008. — 32 pĝ.; 500 ekz.

Petras Čeliauskas, tradukanto kaj redaktoro, kompilis bibliografion de litovaj esperanto-eldonaĵoj. Ĝi listigas ne nur (pri)esperantajn librojn el Litovio, sed ankaŭ librojn eldonitajn alilande de litovaj aŭtoroj, kaj litovlingvajn librojn, kies fonto- aŭ pontolingvo estas Esperanto. Enestas ankaŭ libroj pri famaj litovaj esperantistoj, en kiuj estas menciita Esperanto.

Čeliauskas informas pri presejo kaj eldonkvanto, kiam tiuj informoj troveblas, sed ne ĉiam atentigas nomojn de tradukintoj, kompilintoj aŭ eldonintoj.

Speciala signo indikas la librojn, kiujn posedas la biblioteko de la Esperanto-domo en Kaŭno. Sed kio estis informfonto pri la ceteraj libroj? Ĉu librokolektoj, ĉu aliaj bibliografioj? Sed, ekzemple, la *Bibliografio de Internacia Lingvo* de Stojan kaj la librolistoj de Davidov estas tiom erarplenaj, ke ili ne povas esti utiligataj en serioza bibliografia laboro.

Ĉe pluraj tradukitaj verkoj mankas indiko pri la fontolingvo — precipe — la rusa. Ĉe la lernolibroj ofte mankas indiko pri la litovlingveco. Estas dezirinde havi pli da sistemeco. Komparante la litovan bibliografion kun la plurfoje reeldonita *Bibliografio de Esperantaj kaj interlingvistikaj libroj el Ruslando kaj Sovetunio*, mi konstatis, ke la lasta povus helpi kompletigi la datumojn.

La bibliografio enhavas ankaŭ liston de periodaĵoj kaj plurfojaj eldonaĵoj, kun indiko de la eldonjaroj kaj redaktoroj. Fine troviĝas utila, kvankam ne kompleta, indekso de aŭtoroj, tradukintoj, kompilintoj.

La bibliografio priskribas 276 titolojn, ekde la unua litovlingva lernolibro de Dombrovski-Dąbrauskas, presita en 1890 en la orient-prusa Tilsit (nun Sovetsk), tra kiu tiutempe pasis la vojoj de la litovaj libroportistoj... Laŭ la bibliografio oni konstata elstaran eldonnaktivadon okaze de la 90a UK en Vilno, kiu kulminis per 28 titoloj en 2005!

Ĉar ĝi estas la unua provo de simila bibliografio, la kompilinto alvokas informi pri preterlasitaj eldonaĵoj; ni esperu, ke ĝi servos kiel bona bazo por plia bibliografia agado en Litovio.

Halina Gorecka

Magio de vorto aŭdata

Auld, William. *La infana raso: 2 diskoj kaj libro.* — La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2007.

La parolata kaj, sekve, aŭdata, vorto ĉiam havas sian ĉarmon. La unuaj provoj de niaj Esperanto-pioniroj uzi la lingvon parole (do, aŭde) tuj post la turno de la 20a jarcento rezultis en entuziasmega decido organizi Universalajn Kongresojn. Kiam ni lernas alian lingvon, nin ĉiam helpas laŭta artikulado de novaj sonoj, iliaj kombinoj, vortoj kaj pli longaj tekstoj.

Mi memoras tiun miraklon, kiam mi ekparolis Esperanton post kelkaj jaroj de la Esperanto-soleco — vortoj muldiĝis mirakle kaj sonis fabelmuzike en miaj oreloj. Per sono, la lingvo kaj ties kulturo, animo, spirito — penetras en nin kaj vivigas. Ni, homoj, nur relative ne antaŭlonge lernis legi “mallaŭte, al ni mem” — ankoraŭ en la Antikva tempo oni devis laŭtlegi por **kompreni** la tekston.



Antaŭ pli ol 25 jaroj en Esperantotendara biblioteko en miajn manojn finfine trafis la avide atendita grandioza filozofia poemo, “originale verkita en Esperanto”, *La Infana Raso* de William Auld. Kaj mi penis trovi minutojn liberajn de organizaj zorgoj — legis kaj legis, penetrante la signifojn kaj brilecon de la famega verko, laŭtega himno al la Homo, sobra kaj senfine ama kaj esperiga. Neeviteble mi legis laŭte, ĉar alie ne eblis kaj ne indus, kaj mi volus aŭdi kaj penis imagi kiel ĝin legus la aŭtoro. Mi volis paroli kun li — do aŭdi lian voĉon.

Post multaj jaroj mi aŭdis la voĉon de Auld en sporadaj intervjuoj de Radio Polonia, sed ĉefe lia voĉo, pli imagata, sonis kiam mi legis liajn verkojn.

Kaj jen donaco — la Kooperativo de

Literatura Foiro publikigis la poemon en la propra recito de la aŭtoro mem! Jam post lia forpaso — li restas en ĉi sonoj de sia voĉo, plu vivigante niajn Lingvon kaj Kulturon. Du lumdiskoj (KDoj) en firma koverto kun fotoĵo de la aŭtoro kaj la “representantoj de la eldonejo” (Perla kaj Valerio), broŝuro kun la teksto grafike prezentita kiel en la unua eldono, kun la originaj desegnaĵoj kaj unu el la plej konataj fotoĵoj de Auld. La pro-la-disk-formata kvadrata broŝuro enhavas, krom la poemteksto kun ĉiuj prezentaj specifaĵoj aŭtoraj, kompletajn notojn reviziitajn de la aŭtoro. Ĉio estas senripoĉe bonkvalita, kiel ĉio, kion mi iam vidis el LF-koop.

La voĉon de William Auld oni registris en Skotlando en 1998, kaj finproduktis en ... Meksiko. La poemo, dividita en 25 kantojn, estas legata kun fona muziko varia. La aŭtoro plenumo, mi ĝoje konstatis kaj konfesas, estas superega. La Aulda voĉo sonas elokvente, simple, trankvile sed samtempe forte kaj *penetre*. Mi ŝatus aŭdi opinion de tiu, kiu povus aŭdi tion konscie kaj Esperanto-scie unufoje en sia vivo. La ioma eĥeco aldonita ornamcele plimisterigas kaj profundigas la impreson. Kaj la voĉo restas centre de via atento, ĝi tenas vin ne lasante, kapte. Verkite kiam li estis 32-jara, voĉlegita multe pli poste, la verko restas preskaŭ ekster-tempa — Auld kvazaŭ parolas kun si mem, krom ni.

Iam la presita teksto iuvorte ne tute koincidas kun la dirata — tio nur aldonas al la viveco. Neatendite vi pli profunde komprenas, kian trezoron vi aŭdas/legas/havas — ke en “farita lingvo” kun vi elanime rekte kaj potence parolas pensulo kaj poeto, demandas kaj demandigas vin, pensigas kaj invitas serĉi kaj travivi kaj vivi, gvidante en ega tempa distanco kaj ĉirkaŭkaptante la mondon, kia ni ĝin pensas esti. Oni povas ne kun ĉio konsenti, ne ĉion kompreni kaj des pli ne ĉion akcepti. Sed la teksto diras per si mem, se vi havas orelojn. Okazas magio de vorto legata kaj aŭdata. Aparte laŭdindas la muzika fona akompano — varia, superbe sonanta kaj brile trafa. Nu, ne ĉiujn pecojn mi povis identigi — verŝajne la koncernajn indikilojn indus enmeti, kompletige. Kaj post kiam vi fermas la libron kaj aŭdas la postsonan silenton, vi havas ŝancon aŭdi ion pli — la senmortan sed realan ekziston de viaj pensoj, demandoj, impresoj kaj streboj. Ie ni ĉiuj estas kune.

Andrej Peĉonkin



Literatura konkurso Liro-2008

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2008*.

Liro-2008 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: *Друзьям* de Pjotr Vjazemskij
4. Traduka prozo (el la rusa): *Бемоль* de Valerij Brjusov
5. Traduka prozo (el la angla): *Aloha Oe* de Jack London

En la branĉoj 1–2 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2008.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La tekstoj de la tradukendaj verkoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2008. La organizanto ĝis 1 jan 2011 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro-2008*

Ricevitaj libroj

Auld, William. *La infana raso*: Poemo. — 4a eld. — La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2007. — 112 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Bibliografio de litovijaj Esperanto-eldonaĵoj (1890–2006) / Kompilis Petras Čeliauskas. — Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2008. — 32 pĝ.; 500 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Bociort, Ignat Florian. *Esperanto: Movado, strategio, estetiko, rakontoj*. — Timișoara: Mirton, 2007. — 652 pĝ. — [Donaco de la aŭtoro].

Esperanto kaj mi: Eseoj de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj / Kompilis, antaŭparolis Hori Jasuo. — Maebaŝi: Horizonte, 2007. — 207 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto / Redaktis Anna Löwenstein. — Milano: Federazione Esperantista Italiana, 2007. — 95 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Эсперанто-движение: Фрагменты истории / О.Красников. История союза Эсперантистов Советских Республик (СЭСР); Д.Бланке. История рабочего эсперанто-движения; Сост. и пер. с эсперанто А.Сидорова. — М.: Импэто, 2008. — 216 с., ил.; 400 экз. — [Recenzoekzemplero].

Ricevitaj gazetoj

EAB-Update. 2008/41; Esperanto en Azio. 2008/59; Esperanto en Danio. 2008/1; Esperanto sub la Suda Kruco. 2008/2; Esperanto-USA. 2008/2; Esperanto. 2008/3; Femina. 2008/13; Ĝenerala Informilo. 2008/148; Heroldo de Esperanto. 2008/3,4; Internaciisto. 2008/1; KAE-Informilo. 2008/62; La Brita Esperantisto. 2008/964; La Gazeto. 2008/135; La Ondo de Esperanto. 2008/4; La Revuo Orienta. 2008/2; REGo. 2008/2; Scienco kaj Kulturo. 2008/1; Sennaciulo. 2008/3; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2008/2; Verda Saksofono. 2008/20.

Gazetoj

Literatura Foiro, 2008, №231

Ekis la 39a jarkolekto de LF.

La plej longe, daŭre kaj regule aperanta kultura revuo en esperanto eniris sian 39an jarkolekton. La februara numero anoncas ke teatro restos en la fokuso de *Literatura Foiro* ankaŭ en 2008: certe pro la kovriloj, kiuj celebros la plej renomajn ensemblojn de nia teatro post la dua mondmilito: Bulgara Esperanto-Teatro. En intervjuo kun Ljubomir Trifonĉovski, ĉefredaktoro de LF, la dojeno de la ensemblo, Belka Beleva, trairas la ĉefajn etapojn de duona jarcento da aktiveco.

Bulgara Esperanto-Teatro distingiĝis precipe pro la klasikaj dramoj en esperanta traduko, laŭ mondliteratura koncepto kiu plaĉus al Goethe. Tamen la repertuaro de la bulgaraj esperantaj geaktoroj inkluzivas ankaŭ originalajn aŭtorojn, kiel Marjorie Boulton (kandidato al la literatura Nobel-premio) kaj Giorgio Silfer. Ĉi-lastaj estas eble la sola kiu verkis dramojn por BET, inspirite de la geaktoroj mem, specife de Luna Davidova, Nikolaj Uzunov, Teo Jurukov, Veneta Zjumbjuleva.

La ĉefverko de la esperanta poezio, *La infana raso* de William Auld, estas la temo de eseo de Usui Hiroyuki, kiu recenzas la lastan eldonon de la libro, kun du kompaktaĵoj kie la voĉo de Auld mem deklamas la tutan verkon.

Afriko daŭre gravas, pro la disvolvado de la afrika esperanta intelektularo kaj la apero de la unuaj afrikaj verkistoj. Sed ankaŭ pro la morto de granda amiko al Afriko: Claude Piron. Claude Piron (konata ankaŭ kiel Johán Valano) estis referenco por la esperanta kulturo, kaj precipe por la lingvouzo, dum la lastaj tridek jaroj.

En LF 231 abundas artikoloj, eseoj, poemoj. La revuon posedas, eldonas kaj administras Kooperativo de Literatura Foiro.

HeKo




Por la marta *Maratono* venis 18 respondoj, ĉiuj ĝustaj, krom unu nekompleta kaj du kun malgrava eraro. Ilin sendis Andrej Kirienko (Belorusio), Malcolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen, Erkki Kempainen, Airo & Erkki Röntynen (Finnlando), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Anne Jausions (Francio), Ester Olsen (Norvegio), Howard Gravatt (Nov-Zelando), Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutovič, Jurij Kivajev, Svetlana Konjašova, Sergej Strelec (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La respondoj: 1. Altar'; 2. Raked'; 3. Dardaneloj; 4. Jokoham'; 5. Motacilo; 6. Obei; 7. Itali'; 8. Islamabado; 9. Obstaklo; 10. Odor; 11. Rubikon'; 12. Niagaro; 13. Okcident'; 14. Tribunus'; 15. Sardinia'; 16. Izoterm'; 17. Monak'; 18. Krakovo; 19. Ontario; 20. Orientad'; 21. Dinar'; 22. Riodejanejr'; 23. Rom'; 24. Mediteraneo; 25. Ovoŝel'; 26. Lunarko (lunacio); 27. Orta; 28. Albatros'; 29. Softa.

Dankon pro la atentigo, ke en Jokohamo okazis la 92a UK.

La loto donis premion al **Zbigniew Tylkowski**. Ni gratulas!

Krucvortenigmo "Tri dimensioj"



1. Ŝmiraĵo, per kiu eblas kunigi du objektojn; 2. = Malfermi; 3. Fortika substanco, el kiu konsistas la skeleto de homo; 4. Ĉeriza simbolo de Japanio; 5. = Maldekstra; 6. Longa tabulo, per kiu oni glitas sur neĝo; 7. Narkota substanco; 8. Litero de la greka alfabeto; 9. Unuo de elektra rezistanco; 10. Sento, impresio kaŭzita de surprizo; 11 (horizontale). Italdevena manĝaĵo el platigita pastopeco; 11 (vertikale). Monunuo de multaj Sud-Amerikaj landoj; 12. Matematika simbolo; 13. Literatura verko; 14. Natura kreskaĵo, el kiu oni produktas ŝtofojn; 15. Helpanto por aktoroj, kiuj ne memoras sian tekston; 16. Atingi celon; 17 (horizontale). Plibeligo per aldonitaĵo; 17 (vertikale). Impresi flarsenton; 18. Lirika poemo; 19. Malkonfeso; 20 (horizontale). Pagilo aŭ difinita kvanto da tiu pagilo, uzata kiel interŝanĝilo en vendo kaj aĉeto; 20 (vertikale). Posesivo; 21. Laŭdu tagon ... vespere; 22. Tion povas fari kudristino; 23. Kampo, sur kiu kreskas kulturplantoj; 24. Ĉionkuracilo; 25 (horizontale). Ne ĉiu homo povas esti pap' en ...; 25 (vertikale). Kolekti naturajn produktaĵojn; 26. Indikas; 27. Bambuaspekta plurjara planto; 28. Antikva muzikinstrumento aŭ monero; 29. 10²; 30. La litero "x".

Viaj respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de junio 2008.

Kompilis Viktor Alikin

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

La Dia Kom-svedio?

Redantante tiun ĉi numeron de *La Espero* pri la kongreso en Gotenburgo mi demandis kelkaj Gotenburgoj pri la nomo de ilia gubernio... (*La Espero*, 2008, №1; lupeis Ionel Oneț)

Ĝis kompleta paĝoperdo?

Bonŝance dank al privata paĝo "gazetejo" eblas disfastigi nian revuon. (Rubén Diaconu Tkachenco, en amasmesaĝo akompananta la revuon *Argentina E-Vento*, 2008, №32)

Betoveno el Grizono?

Dum la adiaŭa ceremonio... /sonis/ Matenruĝo, Ek al la lum'! kaj la romanĉo de Beethoven. (*FEN-X*, 2008, №2-4; elpinĉis Ionel Oneț)

De prizono al prizono?

Kubo komencos la venontan 14an de aprilo la servojn de ĉel-telefonoj al la civitanaro... (<http://www.cubanoticoj.ain.cu/2008/0331telefcelular.htm>, 31 mar 2008)

La homoj malaperis, vivu la esperantistoj!

Tiel longe, kiel ekzistis homoj, ili havis bezonon en aparta loko memori kaj honori siajn mortintojn <...> Tia bezono kompreneble ne estas malpli granda inter esperantistoj. (Heroldo Komunikas 350 3-C, 14 apr 2008; malsepultis Ionel Oneț)

De monato al monado?

Komunikoj. Januaro-februaro-mardo. N-ro 129. 2008. (gazetkapo de la bulteno de Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz; elvokis Walter Klag)

Ekskluziva proksimo al pagilo

<...> partoprenas... en la tria Internacia Konferenco de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo <...> delegitoj pri la ĉeka, esperanta <...> lingvo. Esperanton reprezentas ekskluzive, pere de gec-anoj Annette Muhlemann kaj Giorgio Silber, Kultura Centro Esperantista. (<http://www.esperantio.net/index.php?id=521>; rimarkis Kalle Kniivilä)

(Kun)Plukis István Ertl

Rabeno kaj pastro

Rabeno kaj pastro veturis samkupee per trajno. La pastro decidis primoki la rabenon:

— Ni prezentu demandojn unu al la alia. Tiu, kiu ne scios la respondon, pagos al la alia 100 rublojn. Ĉu vi konsentas?

Rabeno: Mi ege ŝatus ludi sed mi ne havas tiom da mono.

Pastro: Do ni faru tiele: se vi ne scios la respondon, vi pagos al mi nur unu rublon. Sed se mi ne scios respondi, mi pagos al vi centon.

Rabeno: Konsentite. Mi volas demandi unua.

Pastro: Bonvolu!

Rabeno: Kiu havas 10 okulojn, 7 flugilojn kaj 4 vostojn?

Pastro (*post longa pripensado*): Mi ne scias. Kio estas la respondo?

Rabeno: Mi tuj diros al vi sed unue pagu al mi la 100 rublojn.

La pastro elpoŝigis 100 rublojn, transdonis al la rabeno kaj kriegis kolere:

— Kio estas la respondo?!

Rabeno: Mi ne scias. Prenu unu rublon!

El la jud-humura kolekto de **Josef Shemer**

Kiam ĉi tiu kajero estis jam engaĝigita, ni ricevis du informojn, kiuj meritus aperigon en novaĵ-rubriko; ni do publikigas ilin ĉi tie anstataŭ malpli aktuala teksto.

En Litovio unika kongreso

Povilas Jegorovas estas realiganta miraklon: unufoje kaj la estraro de UEA kaj la Civita Kapitulo (aŭ iliaj reprezente gravaj partoj) partoprenos en la sama kongreso!

Temas pri Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilno, 26–30 maj 2008. Tie prelegos la Konsulo Giorgio Silfer (pri la cenzuro en la esperanto-informado), sen. Ljubomir Trifončovski (pri la sperto de baldaŭ 40-jara literatura revuo), sen. Perla Martinelli (pri la neceso de feminisma periodaĵo en Esperantio), sen. Dieter Rooke (pri la laborista gazetaro en nia lingvo) kaj c-ino Aneto Muhlemann (pri ĵurnalismo en kaj ekster Esperantio: paraleloj kaj kontrastoj). La kongreson partoprenos ankaŭ sen. Bertil Nilsson. Do kворuma Kapitulo, kaj ĉeesto de du senataj grupoj: la majoritata kaj unu opozicia.

Flanke de UEA partoprenos la kongreson vicprezidanto Claude Nourmont, ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak kaj estrarano José Antonio Vergara.

Okaze de la kongreso sian Asembleon en Vilno havos Esperanta PEN-Centro.

HeKo

Esperanto en Bruselo

15 apr en Bruselo, dum la konferenco de la Eŭropa Komisiono pri multlingvismo, en kiu partoprenis tri reprezentantoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), oni distribuis inter la materialoj ankaŭ raporton pri enketo eŭroprivela pri la lingva stato kaj lingva lernado.

En la raporto (nur en la kompleta anglalingva versio) oni plurfoje mencias Esperanton. 12% el la enketitoj proponis neŭtralan lingvon (lingua franca), inter kiuj 4% Esperanton.

Dum la konferenco reprezentantoj de EEU kelkfoje menciis Esperanton kiel kvalitan propedeŭtikan ilon por pli kvalite lerni plurajn lingvojn kaj Esperanto troviĝas tiusence ankaŭ en la konkludoj de la konferenco.

Zlatko Tišljarić

Donacoj

La fondaĵo *Ilaro*, pri kies sukcesa restarigo ni informis en la aprila *Ondo*, ĝis la 20a de aprilo ricevis kvar donacojn de tri personoj. Nun ĝi enhavas iom pli ol duonon de la minimume necesa sumo (800 eŭroj).

La nuna stato:

Roger Siarri (Francio)	150.00 EUR
Pedro Zurita (Hispanio)	48.00 EUR
Roger Siarri (Francio)	200.00 EUR
Osmo Buller (Nederlando)	35.00 EUR
Sume je 20 apr 2008.	433.00 EUR

Ruslandanoj sendu donacojn poŝte al Галина Романовна Горещкая je nia redakcia adreso aŭ banke (petu informojn pri la konto). Alilandaj donacoj estas bonvenaj ĉe nia UEA-konto avko-u. El kelkaj landoj oni povas sendi monon poŝtmandate.

Koran dankon al la donacintoj kaj al la donacintoj!

Halina Gorecka

Aleksander Korĵenkov



Litovio. 29 mar en Šiauliai okazis tradicia postpaska renkontiĝo *Rideto 2008*. Pri la ĉeftemo “Nederlando — la kongreslando 2008” oni montris siajn sciojn en kvizo, gvidita de nederlandano Rob Keetlaer. Poste okazis diversaj distraĵoj, ludoj, komuna kantado, ekspozicieto de paskaj ovoĵoj, kaj muzikado de fama kantelistino Kristina Kuprytė. (*Gediminas Kazlauskas*)



Ruslando. En la tradiciiĝinta Sankt-Peterburga Lingva Festivalo (vd. pĝ. 8) oni prezentis, interalie, la erzjan lingvon, parolatan ĉefe en Mordovio. (*Sergej Andrejsons*)



Pollando. Valle Perez el Hispanio kaj Ben Indestege el Belgio ĉirkaŭvojaĝas Eŭropon pere de *Pasporta Servo*. Meze de marto en la pollandaj urboj Staszów kaj Tarnów ili renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, estis akceptitaj de la distrikta estraro, konatiĝis kun la bela regiono kaj poste pluvojaĝis al Lublino. (*Andrzej Sochacki*)




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

Tolkien J.R.R. *La Kunularo de l' Ringo*.
La unua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
464 paĝoj, 30 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien J.R.R. *La du turegoj*.
La dua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
368 paĝoj, 27 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO

Tolkien J.R.R. *La reveno de la Reĝo*.
La tria volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
328 paĝoj, 24 eŭroj.



Georges Simenon. *La flava hundo*.
La kvara Esperanto-libro pri komisaro Maigret.
120 paĝoj, 12 eŭroj.